# Ekonomio sen rento kaj inflacio

Margrit Kennedy

Margrit Kennedy

# Ekonomio sen rento kaj inflacio

## Krei monsistemon kiu funkcias por ĉiuj

Tradukita de
Märtha Andréasson
kaj grupo de
La Esperantoklubo de Kungälv

La titolo de la origino: Interest and inflation free money
Margrit Kennedy, 1988
Presita en Svedio ĉe Alfabeto, 2000
ISBN 91-630-9396-0

# Enhavo

Listo pri bildoj 9
Varman dankon 10
Enkonduko 11

*1. Kvar bazaj miskomprenoj pri mono* 13
Miskompreno 1: Ekzistas nur unuspeca kreskado 14
Miskompreno 2: Ni pagas rentumon nur se ni prunteprenas monon 17
Miskompreno 3: En nia nuna monsistemo ni ĉiuj estas egale riĉe dotitaj 19
Miskompreno 4: La inflacio estas nedisigebla parto de la libera merkatekonomio 22

*2. Kiel ni povas krei senrentan kaj seninflacian ekonomion?* 26
La rento anstataŭiĝas per cirkulada kotizo 27
La unuaj modelprovoj 28
La hodiaua solvo 31
Bezono de terposeda reformo 32
Bezono de imposta reformo 36

*3. Kiu profitos de la nova monsistemo?* 38
Tiu lando aŭ tiu regiono, kiu komencos 39
Registaroj, politikistoj, bankposedantoj kaj ekonomikistoj 42
La riĉuloj 48
La malriĉuloj 53
La eklezioj kaj novspiritaj grupoj 58
La komerca kaj industria mondo 59
Terkulturistoj 61
Ekologoj kaj artistoj 62
Virinoj 65

4. *Kion ni povas lerni de la historio?* 67
Brakteatenmoneroj en la mezepoka Eŭropo 68
La Weimarrespubliko kaj la orvaluto 69

5. *Kion mi povas fari por faciligi la aliiĝon?* 71
Estu informita, kreskigu la konsciencon de aliaj 71
Apogu modelprovojn 72
Starigu lokan interŝanĝan komercon 73
Apogu etikajn investojn 74

6. *Monreformo kaj tutmonda ŝanĝo* 76
Evolucio - ne revolucio 76

Notoj 79

## Listo pri bildoj

Bildo 1. Tri fundamentaj tipoj de kreskomodeloj 15
Bildo 2. Eksponencialaj kreskokurboj 16
Bildo 3 Ekzemploj de la rentuma parto en ordinaraj prezoj kaj kotizoj 18
Bildo 4. Komparo inter rentumaj elspezoj kaj rentaj enspezoj por 10 diversaj enspezkategorioj kun 2,5 milionoj da familioj en ĉiu. 20
Bildo 5. La evoluo ene de diversaj ekonomiaj sektoroj 23
Bildo 6. Pro la inflacio ĉiu germana marko valoras nur 28 pfenigojn 24
Bildo 7. Por pagi konstrugrundon en okcidenta Germanio oni devas labori trifoje tiel longa tempo dum la 1980-aj jaroj kiel dum la 1950-aj jaroj. 33
Bildo 8. Kial la ekonomio fiksiĝas en la raddentoj? 43
Bildo 9. Okcidenta Germanio 1950 - 1985 45
Bildo 10. Ĉu vi iam vidis monon labori? 46
Bildo 11. La divido de la mona bonstato en Okcidenta Germanio 52
Bildo 12. Kiam mankas mono la rentumo altiĝas, kio siavice kaŭzas kreskantan senlaborecon kaj bankrotojn. 54
Bildo 13. Subvenciado. Ĉiutage La Tria mondo pagas 200 milionojn da dolaroj de rentumo al ni! 55
Bildo 14. La Tria mondmilito jam komenciĝis. 56
Bildo 15. La labora prezo estas pli ol nur la salajro 60
Bildo 16. Hura, denove 2,5%-a alkresko! 63
Bildo 17. Senlaboreco donas malriĉecon, malriĉeco radikaligas. 69

## Noto

La ilustraĵoj baziĝas je sciencaj diagramoj, kiuj estas faritaj de Helmut Creutz. Krom la ilustraĵoj, kiuj temas pri rentoj kaj rentumoj, ĉio de la cetera statistiko estas prenita el publikaĵoj eldonitaj de la Centra Banko de Okcident-Germanio kaj la Statistika buroo de Okcident-Germanio kaj aliaj oficialaj dokumentoj. La rentumkalkuloj, kiuj estas faritaj, venas de tiuj fontoj.

## Varman dankon

Ĉi tiu libro ekzistas dank'al tiuj multaj homoj ĉie en la mondo, kiuj same kiel mi mirigite eltrovis la bone kaŝitan difekton de nia nuna monsistemo. La scivolemo kaj entuziasmo de tiuj homoj pri korekta analizo kaj ilia volo solvi la problemon igis min kompreni, ke la temo estu prezentata en maniero komprenebla por ĉiuj. Mi volas precipe danki al tri instruistoj, kiuj inspiris kaj apogis min de la komenco: Helmut Creutz, Dieter Suhr kaj Gesima Vogel. Mi ankaŭ volas direkti specialan dankon al mia edzo Declan kies redakcia, morala kaj praktika subteno helpis min preter la malfacilaĵojn survoje al la fino de tiu ĉi verko.

# Enkonduko

Certa grado de kuraĝo estas postulata de neekonomiisto, se li aŭ ŝi intencas skribi libron pri ekonomio precipe se temas pri unu el la plej gravaj ekonomiaj mezuriloj: mono. Mono estas la mezurilo per kiu la plej multaj ekonomiaj konceptoj esprimiĝas. Ekonomiistoj utiligas ĝin kiel komercistoj kilogramon kaj arkitektoj metron. Ili pridubas apenaŭ kiamaniere mono funkcias aŭ kial ĝi nuntempe - kontraste al kilogramo kaj metro - ne estas konstanta sed varias, preskaŭ ĉiutage.

Tiu ĉi libro esploras, kiel mono funkcias. Ĝi malkovras la kaŭzon de la konstantaj ŝanĝoj de unu el niaj plej gravaj mezurunuoj. Ĝi klarigas ne nur kial mono "rotaciigas la Teron", sed ankaŭ kial mono samtempe ruinigas ĝin. La granda ŝuldoŝarĝo de la tria mondo, la senlaboreco, la media polucio, la militista armado, same kiel la direktiĝo al atomenergio havas ĉiuj reciproke ligon kun tiu mekanismo, kiu igas la monon cirkuli: la sistemo de rentumoj kaj kunmetitaj rentumoj. Tio estas "la nevidebla detrumekanismo" en ĉiuj t.n. libermerkataj ekonomioj, laŭ John L King.

Ne estas tiel malfacile kiel eble ŝajnas, ŝanĝi tiun mekanismon tiel ke mono cirkulas en pli oportuna maniero. La solvo, priskribita en tiu ĉi libro, estis konata de eta nombro da homoj depost la komenco de tiu ĉi jarcento. Nun ŝajnas al mi ke la tempo denove estas oportuna prilumi tiun ĉi ideon. Skribi libron, kompletigitan per prelegoj kaj kursoj pri la temo ĝuste nun donas bonan ŝancon realigi la ideon.

La celo de la libro ne estas pruvi ke iu eraras. La intenco estas ĝustigi kaj atentigi pri alternativo, kiu apenaŭ estas konata inter fakuloj - por ne paroli pri ordinaraj homoj. Tamen la demando estas tro grava por ke fakuloj sole decidu ĉu diskuti ĝin aŭ ne. La apartaĵo de tiu ĉi libro tial estas la maniero klarigi komplikajn problemojn kiel simple plej eblas, por ke tiamaniere ĉiuj, kiuj utiligas monon povu kompreni, kio estas riskata. Alia grava diferenco kompare kun antaŭaj libroj en tiu ĉi ĝenro estas ke ĝi montras kiel - ĵus je tiu ĉi momento - transformo al la nova ekonomia sistemo kreu situacion, avantaĝan al ĉiuj, kaj kiu finfine povos helpi krei solidan ekonomion.

La demando restas: Ĉu ni povos ŝanĝi la nunan sistemon antaŭ la venonta granda disfalo - aŭ nur poste. Kiel ajn estos gravas ekhavi scion pri kiel oni povas formi merkatan sistemon favoran al ĉiuj homoj.

## Enkonduko II

(De Märtha Andréasson kaj la grupo, kiu esperantigis la tekston.)

Origine la libro estas eldonita en 1988, dum Sovet-Unio ankoraŭ ekzistis. Ni rekte tradukis ĝin sen konsideri, kio okazis poste. Tial estas kelkloke komparoj inter la du ekonomiaj sistemoj en la libro. Sed cetere la enhavo same bone validas, ĉar nenio ŝanĝiĝis pri la libra temo. La situacio multloke eĉ akriĝis.

Estas nun, en 1999, aliaj rentoprocentaĵoj, momente pli malaltaj. Sed la problemo restas; la riĉuloj riĉiĝas pli kaj pli dum la malriĉuloj malriĉiĝas.

Tial estas nia espero, ke ĉi tiu esperanta eldono helpu disvastigi la ideojn pri alispeca ekonomia disdivido en la mondo.

# 1. Kvar bazaj miskomprenoj pri mono

Preskaŭ ĉiuj sur nia planedo ĉiutage uzas monon. Tamen estas malmultaj, kiuj komprenas kiel mono funkcias kaj influas niajn vivojn, rekte kaj nerekte. Tial ni pli detale pristudu kio estas mono kaj kio okazus se ĝi ne ekzistus?

Unue la bonaj flankoj: Mono estas unu el la plej geniaj inventoj de la homaro. Ĝi faciligas ŝanĝon de varoj kaj servoj, forigante barojn ligitajn kun interŝanĝa komerco, t. e. rekta interŝanĝo de varoj kaj servoj. Se vi ekzemple loĝas en vilaĝo, tute dependa de interŝanĝa komerco, kaj produktas artaĵojn, kiujn neniu tie volas interŝanĝi, krom eble la funebraĵisto, vi devas ŝanĝi okupon aŭ forlasi la vilaĝon. La mono sekve ebligas specialiĝon, kiu estas kondiĉo por nia civilizo.

Nu, kial do ni havas "monproblemon"?
Jen estas la malbonaj flankoj: Mono helpas nin ne nur interŝanĝi varojn kaj servojn. Ĝi povas ankaŭ bari tiun interŝanĝon, nome se ĝi estas retenata de tiuj, kiuj havas pli ol ili bezonas. Tiele ĝi kreas ian privatan "doganpordon", kie tiuj, kiuj havas malpli ol ili bezonas estas devigataj pagi kotizon al tiuj, kiuj havas pli ol ili bezonas. Tio vere ne estas justa sistemo. Fakte estas ke nia nuna monsistemo - kion mi montros poste - povas esti klasigita konstitucie abomena en la plej multaj demokratiaj ŝtatoj. Lasu min diri, antaŭ ol mi pritraktas pli da detaloj - ke verŝajne ekzistas pli ol ĝuste kvar miskomprenoj koncerne monon. Nia koncepto pri mono reprezentas sufiĉe ekzaktan spegulbildon de nia koncepto

pri tiu ĉi mondo en kiu ni vivas, kaj estas tial same varia kiel la nombro da homoj sur nia tero. La kvar miskomprenoj, kiujn ni pli poste diskutos, tamen estas la plej ordinaraj malhelpaĵoj por kompreni kial ni devas ŝanĝi la nunan monsistemon, kaj kiujn mekanismojn ni bezonas por anstataŭigi ĝin per nova sistemo.

## Miskompreno 1: Ekzistas nur unuspeca kreskado

La unua miskompreno estas interligita kun kreskado. Ni emas kredi ke troviĝas nur unu speco de ekspansio, nome la propra pliiĝa modelo de la naturo kiel ni mem spertis ĝin. Bildo 1 tamen montras tri ordinarajn sed diferencajn modelojn:


Kurbo a reprezentas en plibeligita formo la normalan *fizikan kreskon* de la naturo, tiu kiun niaj korpoj, kreskaĵoj kaj bestoj sekvas. Ni kreskas rapide dum la unua parto de nia vivo, poste iom pli malrapide dum la adoleskaj jaroj, kaj ordinare nia fizika kreskado ĉesas je nia 21a jaro. Tio tamen ne malhelpas nin kreski ankoraŭ pli - kvalite anstataŭ kvante.

Kurbo b montras mekanan aŭ *linearan kreskon*; ekzemple: pli da maŝinoj produktas pli da varoj, pli da karbo produktas pli da energio. Tio estas aktuala ĝis la maŝinoj estas haltigataj aŭ ĝis la alportado de karbo ĉesas.

Kurbo c montras *eksponencialan kreskokurbon*. Oni povas priskribi ĝin kiel rekta kontrasto al kurbo a, ĉar komence la kresko estas malrapida por poste hastegi alten preskaŭ vertikale. En la biologia regno tiu ekzemplo ordinare ekestas konekse kun malsano kaj morto. Kancero ekzemple sekvas eksponencialan kurbon. Komence ĝi kreskas malrapide, tamen la tutan tempon kun pli rapida hasto. Ofte ĝi, kiam ĝi malkovriĝas, jam atingis tian fazon de kreskado, ke ne plu eblas haltigi ĝin. Eksponenciala kreskado ordinare finiĝas per la morto de kaj la gastig-

Bildo 1

## Tri fundamentaj tipoj de kreskomodeloj




anta kaj ankaŭ de la gasta organismo.


La sistemo kun rento kaj kunmetitaj rentoj kun regulaj intervaloj duobligas nian monon; t.e. ĝi sekvas eksponencialan kurbon. Tio klarigas la kaŭzon kial ni hodiaŭ spertas tiajn problemojn pri nia monsistemo. *La rento funkcias kiel kancero en nia socia organizo.*

Bildo 2 montras la bezonatan tempon por duobligi nian monon:
rento de 3% + kunmetitaj rentoj postulas 24 jarojn
rento de 6% - 12 jarojn
rento de 12% - 6 jarojn.

Ankaŭ je kunmetitaj rentoj de 1% ni ricevas eksponen-

Bildo 2

## Eksponencialaj kreskokurboj




cialan kreskokurbon kun duobliga tempo de 70 jaroj.

Per nia propra korpo ni havas sperton nur pri la fizika kreskokurbo, kiu laŭ la propraj leĝoj de la naturo haltas ĉe optimuma grandeco (kurbo a). Tial estas malfacile por ni homoj kompreni la influon de la eksponenciala kreskokurbo sur la materio.

Tiu fenomeno estas plej bone priskribita per helpo de la fama rakonto pri la persa imperiestro, kiu estis tiel ravita de nova ŝakludo ke li promesis plenumi kiun ajn deziron, kiun la inventisto prezentu. Tiu lerta matematikisto tiam petis pri unu grenero sur la unuan kvadraton de la ŝaktabulo, kaj duoble tiel multe kiel estas sur la antaŭa

kvadrato sur ĉiujn sekvajn kvadratojn. La imperiestro unue ekĝojis pro tia senpretenda deziro, sed post nelonge li komprenis ke la profito de la tuta imperio ne sufiĉus por kontentigi tiun "senpretendan deziron". Antaŭ nelonge iu kalkulis, ke por atingi la necesan kvanton por la 64a kvadrato estus bezonata 440-oble la grenan rikolton de 1982.[1]

Samspeca ekzemplo konekse kun nia temo: Por unu penio investita kun rento de 4% je la tempo de la Jesua naskiĝo oni povus en la jaro 1750 aĉeti orbulon same pezan kiel nia planedo. En 1990 oni povus aĉeti 12 246 tiajn orbulojn. Kun rento de 5% oni povus aĉeti la orbulon jam en la jaro 1403, kaj en la jaro 1990 la penio valorus 2 742 000 000 000 orbulojn, ĉiu el ili same peza kiel nia tero.[2] La ekzemplo montras kian diferencon 1% faras dum pli longa periodo. *Ĝi ankaŭ montras ke kontinua pagado de rentumo kaj kunmetitaj rentumoj estas kaj kalkule kaj praktike neeble.* La ekonomia neceso kaj la matematika malebleco kreas kontraŭdiron kiu, por esti solvita, kondukis al nenombreblajn batalojn, militojn kaj revolucioj n.

La solvo de la problemoj, kaŭzitaj de la eksponenciala kreskado, estas krei monsistemon kiu sekvas la naturan kreskokurbon. Tio postulas ke oni anstataŭigas rentumon per alia mekanismo, kiu cirkuligas la monon. Ni revenos al tio en ĉapitro 2.

## Miskompreno 2: Ni pagas rentumon nur se ni prunteprenas monon

Ankoraŭ unu motivo kial estas tiel malfacile kompreni la amplekson de la rentuma mekanisma influo al nia nuna monsistemo, estas ke ĝi agas kaŝe. La dua miskompreno sekve estas ke ni pagas rentumon nur por prunteprenita mono, kaj se ni volas eviti pagi rentumon ni nur ne prunteppreni monon.


Bildo 3

# Ekzemploj de la rentuma parto en ordinaraj prezoj kaj kotizoj

## 1. Kostoj por rubaĵforportado

Ekzemploj de la urbo Aachen en 1983.


| | | |
|---|---|---|
| a) | Depreco, fiksaj kostoj de personaro, ceteraj fiksaj kaj variaj kostoj | 88 % |
| b) | Rentumo de kapitalo | 12 % |
| | Prezo por 110 litroj da rubo 194 g.m. | 100 % |




## 2. Kostoj por trinkakvo

Ekzemplo de "La Nordgermana trinkakva provizado" en 1981


| | | |
|---|---|---|
| a) | Energikostoj | 7 % |
| b) | Kuranta riparo de akvoprovizejoj | 6 % |
| c) | Akvotraktado (purigado, klorizado, k.t.p.) | 1 % |
| d) | Personaraj kostoj, ceteraj fiksaj kaj variaj kostoj | 18 % |
| e) | Depreco | 30 % |
| f) | Rentumo de kapitalo | 47 % |
| | Prezo por m³ 1,36 g.m. | 100 % |




## 3. Kostoj por la kloaksistemo

Ekzemploj de la urbo Aachen en 1983


| | | |
|---|---|---|
| a) | Fiksaj kostoj | 19 % |
| b) | Personaraj kostoj | 7 % |
| c) | Depreco | 27 % |
| d) | Rentumo de kapitalo | 47 % |
| | Prezo por m³ 1,87 g.m. | 100 % |




## 4. Lukostoj en publikservaj loĝejoj

Laŭ kalkuloj de la okcidentgermana statistika centra buroo en 1979

| | | |
|---|---|---|
| a) | Risko kaj gajno | 1 % |
| b) | Administrado kaj funkciadaj kostoj | 6 % |
| c) | Kuranta riparlaboro de konstruaĵoj | 5 % |
| d) | Depreco | 11 % |
| e) | Rentumo de kapitalo | 77 % |
| | Lukosto por m² 13,40 g.m. | 100 % |



Bildo 3 montras ke tio ne estas vero, ĉar rentumo estas inkludita en ĉiu prezo, kiun ni pagas. La ekzakta sumo varias depende de la rilato inter laborkostoj kaj kapitalkostoj por tiuj produktoj kaj servoj, kiujn ni aĉetas. Certaj ekzemploj tre klare montras tion. Rentuma kosto por forigo de balaaĵoj estas 12%, ĉar ĉi tie la parto de la kapitalkosto estas relative malalta kaj la parto de la laborkostoj speciale alta. Koncerne trinkakvan prizorgadon la rentumaj kostoj altiĝas ĝis 38% kaj por publikaj loĝejoj ĝis 77%. Meznombre ni pagas ĉirkaŭ 50% kiel rentumaj kostoj por niaj produktoj kaj servoj.

Se ni povus forigi la rentumon, kaj anstataŭigi ĝin per alia mekanismo por konstante cirkuligi la monon, la plej multaj el ni, aŭ povus fariĝi duoble riĉaj, aŭ bezonus labori nur duone tiel multe por konservi la saman vivnivelon kiel hodiaŭ.

## Miskompreno 3: En nia nuna monsistemo ni ĉiuj estas egale riĉe dotitaj

Tria miskompreno pri nia monsistemo povas esti vortigita tiel ĉi: Ĉar ĉiuj devas pagi rentumon, kiam ili prunteprenas monon (aŭ aĉetas varojn kaj servojn) ĉiuj vivas egale bone (aŭ malbone) en nia nuna monsistemo.

Denove malvero. Estas vere grandaj diferencoj inter tiuj, kiuj profitas kaj tiuj kiuj devas pagi en ĉi tiu sistemo. Bildo 4 montras komparon inter rentumoj kaj rentoj en 10 nombre egale grandaj grupoj de la loĝantaro de Okcidenta Germanio. Ĝi indikas ke la unuaj 8 grupoj pagas pli ol ili ricevas, ke la 9a grupo ricevas iomete pli da rento ol ĝi pagas kiel rentumo kaj ke la 10a grupo ricevas ĉirkaŭ duoble tiom da rento kiom ĝi pagas rentume, t e ĉiuj tiuj partoj, kiujn la plej unuaj 8 grupoj perdis. Tio montras ankaŭ simple kaj klare kial "la riĉaj riĉiĝas kaj la malriĉaj malriĉiĝas".

Se ni rigardas pli detale al la lastaj 10% de la loĝantaro

Bildo 4


## Komparo inter rentumaj elspezoj kaj rentaj enspezoj por 10 diversaj enspezkategorioj kun 2,5 milionoj da familioj en ĉiu.

La sumo de rentaj enspezoj = la sumo de rentumaj elspezoj = 270 miljardoj da DEM (1982)

Averaĝa rentumprocentaĵo = 5,5 %

Ĉiuj nombroj en 1000 DEM po familie kaj jare

Mastrumaj grupoj ene de diversaj enspezklasoj...




| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Enspezo pofamilie (en 1000 DEM) | 2,3 | 4,1 | 5,9 | 6,5 | 7,6 | 9,1 | 10,5 | 13,5 | 16,3 | 32,3 |
| Rentoenspezo pofamilie | 0,5 | 0,7 | 1,1 | 1,5 | 2,3 | 3,2 | 5,5 | 8,8 | 18 | 66,5 |
| Bilanco | 1,8 | 3,4 | 4,8 | 5 | 5,3 | 5,9 | 5 | 4,7 | -1,7 | -34,2 |

koncerne rentajn enspezojn montriĝas ankoraŭ unu modelo de eksponenciala kreskado. La lasta 1% de la loĝantaro nome havas enspezon tiom granda, ke la kolono en bildo 4 bezonus esti farata ĉirkaŭ 10-oble pli alta. Por la plej lasta 0,1% de la loĝantaro ĝi bezonus esti farata pli ol 100-oble pli alta.

Alivorte: nia monsistemo permesas kaŝitan realporton, kiu senĉese kaj kaŝe formanipuladas monon de tiuj kiuj havas malpli ol ili bezonas al tiuj kiuj havas pli ol necese. Tio estas alikaraktera kaj konciderinde pli rafinita kaj efika formo de ekspluatado ol tiu, kiun Marx provis ĝustigi. Sendube li pravis kiam li atentis pri la fonto de "la plusvaloro" en *la produkta sfero*. *La disdivido* de "la plusvaloro" tamen grandparte okazas interne de *la sfero de moncirkulado*. Tio estas pli klare rimarkebla hodiaŭ ol dum la tempo de Marx. Ankoraŭ pli grandaj sumoj estas akumuligitaj ĉe ankoraŭ pli malmultaj individuoj kaj kompanioj. Ekzemple tiu troaĵo da mono, kiu ĉirkaŭfluas en la mondo ĉie kie oni povas antaŭvidi profiton pro ŝanĝoj de valutaj kurzoj aŭ akcioj, estas duobligitaj de 1980. Nur en Nov Jorko la ĉiutaga valutkomercado kreskis de 18 miliardoj da dolaroj en la jaro 1980 ĝis 50 miliardoj da dolaroj en 1986.[3] La Monda Banko taksis ke la montransakcioj en la mondo estas 15- ĝis 20-oble pli grandaj ol necesas por la mondkomerco.[4]

La mekanismo de rento kaj kunmetitaj rentoj kreas ne nur impulson al abnorma ekonomia kreskado, sed ĝi funkcias, kiel Dieter Suhr atentigis, ankaŭ konflikte kun konstituciaj rajtoj de la individuo en la plej multaj landoj.[5] Se konstitucio garantias al ĉiu individuo egalan uzrajton al ŝtata servado, kaj monsistemo probable apartenas al tio, tiam estas neleĝe apliki sistemon, kiu seninterrompe donas al 10% de la loĝantaro pli ol ili pagas por tiu servo - je la kosto de tiuj 80%, kiuj ricevas malpli ol ili pagas.

Eble ŝajnas ke ŝanĝo de nia monsistemo estus favoro "nur al" 80% de la loĝantaro, t.e. tiuj kiuj nun pagas pli ol sia justa kvoto. Tamen en ĉapitro 3 mi montros ke ĉiuj

profitus de ŝanĝo, ankaŭ tiuj kiuj gajnas de nia hodiaŭa kancereca sistemo.

## Miskompreno 4: Inflacio estas nedisigebla parto de la libera merkatekonomio

La kvara miskompreno estas ligita kun la rolo de la inflacio en nia ekonomia sistemo. Por la plej multaj homoj inflacio ŝajnas esti nedisigebla parto de kiu ajn monsistemo, preskaŭ natura, ĉar ekzistas neniu kapitalista lando kun libera merkata ekonomio, kiu estas seninflacia. Bildo 5 "La evoluo ene de diversspecaj ekonomiaj sektoroj en Okcidenta Germanio", atentigas pri kelkaj faktoroj, kiuj verŝajne kaŭzas inflacion. Dum la enspezoj de la ŝtato, BNP kaj la mezvalora salajro nur kreskis kun ĉirkaŭ 300% ekde 1968 ĝis 1982, la rentumo, kiun pagis la ŝtato, kreskis kun 1 160%. Ke oni fakte sukcese trapasis tion dependis de tio, ke oni en 1982 absolutnombre pagis 29 miliardojn da markoj, dum BNP tiutempe estis 1 600 miliardoj da markoj.

La tendenco estas evidenta: pli malpli frue la ŝtataj ŝuldoj preterkreskos la enspezojn, ankaŭ en la industriaj landoj. Ekzemple: Se infano kreskus trioble sian propran alton de sia unua ĝis sia naŭa jaro, kaj samtempe la piedoj de la infano kreskus 11-oble la grandecon de la piedoj, tiam ni opinius tion ne normale. La problemo koncerne la ekonomion estas ke nur kelkaj homoj vidas la malsansignojn de ĝi. Ankoraŭ malpli da homoj konas iun kuracilon kaj neniu sukcesis enkonduki "sanige efikan" metodon por daŭra resaniĝo.

Malgranda nombro da homoj komprenas ke inflacio nur estas alia tipo de impostado, per kiu la ŝtato havas eblecon transigi la plej grandajn problemojn pri kreskantaj ŝuldoj. Evidente estas ke ju pli granda diferenco estas inter enspezoj kaj ŝuldoj des pli alta inflacio estas bezonata. Kiam la centra banko ricevas permeson presi pli da

de 10% fariĝas 900 miliardoj, kio siavice estas pagataj per plialtgitaj prezoj, kio egalas al 4% de prezaltiĝoj, kio de ekspertaro estas rigardata kiel inflacio. Mi ĉiam opiniis, ke la sistemo de kunmetitaj rentumoj estas nevidebla perea mekanismo, kiu laboregas ĝuste nun. Ni tial devas senigi nin de tiu senpripensa financa fiksado."

En Usono okazis, dum la lastaj 33 jaroj, 1 000% de altiĝo de privataj kaj publikaj ŝuldoj. La plej granda parto devenas de la privata sektoro. Sed ĉiuj disponeblaj rimedoj de la federacia ŝtato estas utiligitaj por stimuli ĉi tiun ekspansion: pruntgarantiojn, subvenciadon de hipotekaj pruntaĵoj, malaltajn kontante pagendajn sumojn kaj avantaĝajn kondiĉojn, impostkreditojn, duarangajn merkatojn, asekurajn fondusojn k a. La celo de tiu politiko - kiu estas la ununura metodo fari la rentumosistemon tolereblan al la popolo - estas krei ekonomian ekspancion kiu sekvas la eksponencialan kurbon - erara rondo kun akcelanta spiralefiko.

Aŭ ni nun rigardas inflacion, socialan malegalecon aŭ mediajn konsekvencojn, ŝajnas el multaj vidpunktoj saĝe ŝanĝi tiun "senpripensan financan fiksadon" kontraŭ pli taŭga mekanismo por teni la monan fluadon en funkcio.

## 2. Kiel ni povas krei senrentuman kaj seninflacian ekonomion?

Je la fino de la 19a jarcento Silvio Gesell, sukcesplena komercisto en Germanio kaj Argentino, observis ke liaj varoj kelkfoje vendiĝis rapide kaj je alta prezo, kelkfoje malrapide kaj je pli malalta prezo. Li ekcerbumis pri la kialo de tio. Baldaŭ li komprenis, ke tiuj ĉi altiĝoj kaj malaltiĝoj malmulte dependis de la bezonoj de la homoj de ĝuste liaj varoj, aŭ de la kvalito de tiuj, sed preskaŭ nur de kiu "prezo" la mono havis en la monmerkato.

Li ekstudis tiujn fluktuadojn pli zorgeme kaj tiam komprenis ke kiam la rentumaj normoj estis malaltaj tiam la konsumado de varoj estis granda, kiam ili estis altaj tiam la homoj rezignis aĉeti. La kialo de tio, ke kelkfoje ekzistis pli da mono kaj kelkfoje malpli estis la preteco de la monposedantoj pruntedoni sian monon. Se ilia profito fariĝus malpli ol rento de 2,5%, ili montris emon reteni la monon, per kio ili kaŭzis halton de investoj, kun sekvantaj bankrotoj kaj reduktita nombro da laboroj. Post iom da tempo, kiam homoj pretis pagi pli altan rentumon por pruntepreni monon, tiuj denove estis akireblaj. Nun oni estis pretaj por nova "rondiro": unue kun alta rentuma normo kaj altaj varoprezoj, ĝis iom post iom granda kvanto da mono estus kreonta pli malaltan rentumon kaj - fine - novan "kapitalstrikon".

La klarigo de Silvio Gesell de tiu ĉi fenomeno estis ke mono, diference de ĉiuj aliaj varoj kaj servoj, povas esti konservataj sen iaj kostoj. Se persono posedas korbon kun pomoj kaj alia havas monon por aĉeti la pomojn, tiam la pomposedanto estos devigata vendi post nelonga tempo

por ne perdi sian provizon. La monposedanto, kontraŭe, povas atendi ĝis la prezo konvenas al li. Mono ne postulas iajn enmagazenigajn kostojn.

Gesell sekve faras sian konkludon: Se ni povus krei monsistemon, kiu egaligus monon al ĉiuj aliaj varoj kaj servoj en la socio (premisante prizorgadan koston je averaĝe 5% jare, kio historie estas kiom homoj pagis rentume) - tiam ni povus ricevi ekonomion, libera de fluktuadoj kaŭzitaj de spekulado en mono. Li proponis, ke mono estu farata en tia maniero, ke ĝi "rustiĝu". Alimaniere esprimata, ĝi povus esti submetata al "uzadkotizo".

## La rento anstataŭiĝas per cirkulada kotizo

En 1890 Silvio Gesell formulis teorion pri mono kaj pri "natura ekonomia ordo"[6] kiu rilatas al la kapitalismo aŭ la komunismo kiel la mondbildo de Ptolemaios al tiu de Koperniko. La suno fakte ne rondiras la teron; la tero rondiras la sunon - malgraŭ ke niaj sensoj ankoraŭ kontraŭstaras ĉi tiun sciencan veron. Gesell proponis ke ni certigu la monfluon per tio, ke ni faru la montraktadon al ŝtata servo, submetata uzadkotizon.

*Anstataŭ pagi rentumon al tiuj kiuj jam havas pli da mono ol ili bezonas, homoj - por reporti monon en la cirkuladon - devus pagi etan kotizon se ili tenus la monon ekster la cirkuladon.*

Por kompreni ĉi tiun ideon pli bone povas helpi kompari monon kun trajna vagono, kiu ja ankaŭ faciligas la interŝanĝon de varoj kaj servoj. La diferenco tamen estas ke la fervoja kompanio ne pagas al la uzanto sumon por ke tiu malŝarĝu la vagonon, tiel ke ĝi povu denove eniri la "cirkuladon". Anstataŭe la uzanto pagas etan kotizon potage, se li ne malŝarĝas ĝin. Tio estas ĉio, kion ni bezonus fari pri mono. Tiu socio aŭ lando, kiu eldonas "novan monon" - por faciligi la interŝanĝon de varoj kaj servoj - prenas etan "parkokotizon" de tiu uzanto, kiu tenas

la novan monon pli longe ol postulas la interŝanĝa procedo. Tiu ŝanĝo, kiel ajn simpla ĝi ŝajnas esti, solvas ĉiujn tiujn sociajn problemojn, kiujn - tra la historio - kaŭzis la sistemo kun rentumo kaj kunmetitaj rentumoj.

*Se la rento hodiaŭ nur donas privatan profiton, uzadkotizo donus profiton al ĉiuj.* Tiu kotizo estu devigata reiri en la cirkuladon por teni la ekvilibron inter la kvanto de mono kaj responda "kvanto" de ekonomiaj aktivecoj. La kotizo servu kiel enspezo al la ŝtato kaj tial malgrandigi la bezonon de impostoj por publikaj elspezoj.

La teknika flanko de tiu ĉi financa reformo estos klarigita en la du sekvaj ĉapitroj.

## La unuaj modelprovoj

Dum la 1930a periodo societo, kies anoj estis adeptoj de la Gesela teorio kaj nomis sin "Freiwirtschaft" (libera ekonomio), ekhavis okazon iniciati projekton kun senrentuma mono, kaj por liberiĝi de la senlaboreco kaj por montri la fortecon de ĉi tiu ideo. Provojn enkonduki senrentuman monon oni faris en Aŭstrio, Francio, Germanio, Hispanio, Svisio kaj Usono. Unu el la plej sukcesaj provoj realiĝis in Wörgl en Aŭstrio.[7]

Dum la jaroj 1932 kaj 1933 stariĝis en la urbeto Wörgl eksperimento, kiu ekde tiam donis inspiron al ĉiuj, kiuj aktive interesiĝas pri reformo de la monsistemo. La urbestro konvinkis komercistojn kaj administrantojn ke ili povus ĉion gajni kaj nenion perdi per realigado de moneksperimento laŭ tiu teorio, kiun Silvio Gesell priskribis en sia libro *Die Natürliche Wirtschaftsordnung* (La natura ekonomia ordo).

La homoj en Wörgl akceptis tion kaj la urba estraro presigis kaj eldonis 5000 "liberajn ŝilingojn" (t.e. senrentumajn ŝilingojn), kovritajn per same granda sumo en ordinaraj ŝilingoj en la banko. Per helpo de la nova

mono oni konstruis ponton, plibonigis vojojn, same pri publikaj servoj, pagis salajrojn kaj varojn; la mono estis akceptita de la buĉisto, la ŝuisto, bakisto k.t.p.

La uzadkotizo estis 1% pomonate aŭ 12% pojare. La kotizo estis pagata de tiu persono, kiu havis la monbileton ĉe la fino de la monato. La pagatesto estis eta "poŝtmarko" kiu havis valoron de 1% de la monbileta valoro kaj ĝi estis gluata dorsflanke de la monbileto. Se tio ne okazis, la monbileto poste fariĝis senvalora. Por eviti tiun etan kotizon, ĉiuj, kiuj ricevis pagon en liberaj ŝilingoj rapide konsumis ilin antaŭ ol ili uzis sian ordinaran monon. Homoj pagis eĉ siajn impostojn anticipe por ke ne estu devigata pagi la etan kotizon. En unu jaro cirkulis la 5000 ŝilingaj monbiletoj 463 fojojn kaj produktis tiamaniere varojn kaj servojn valorajn pli ol 2 300 000 ŝilingojn (5000x463). La ordinara ŝilingo, kontraŭe, cirkulis nur 213 fojojn.[8]

En tempo, kiam la plej multaj landoj en Eŭropo havis gravajn problemojn kun reduktita nombro da laborlokoj, la nombro da senlaboruloj en Wörgl malgrandiĝis je 25% dum ĉi tiu ununura jaro. La kotizoj, kiuj kolektiĝis de la urba magistrato, kaj kiuj kaŭzis ke la mono tiel ofte ŝanĝis posedanton, sumiĝis je entute 12% de 5 000 liberaj ŝilingoj = 600 ŝilingoj. Tiu sumo estis uzata por publikaj celoj kaj neniu unuopulo profitis de tio, sed utilis fakte al la tuta socio.

Kiam poste pli ol 300 komunumoj en Aŭstrio montris intereson por ĉi tiu modelo, la nacia banko de Aŭstrio vidis sian propran monopolon minacata. La banko intervenis en la urba konsilantaro kaj malpermesis la presadon de la loka, libera mono. Malgraŭ longdaŭra batalo, kiu iris ĝis la plej supera tribunalo de Aŭstrio, nek Wörgl nek ia alia eŭropa socio povis ripeti la eksperimenton ĝis ĉi tiu tago.

En sia libro *Capitalism at its best* [9] (kapitalismo kiam ĝi estas plej bona) Dieter Suhr prezentas raporton de Hans

R L Cohrssen pri la "stamp-scrip"-movado en Usono. Cohrssen provis - ankaŭ en 1933 - kune kun la ekonomikisto Irving Fischer, enkonduki la ideon de Gesell pri kostoportanta ekonomio en Usono. Je tiu tempo pli ol 100 municipoj, el kiuj pluraj estis grandaj urboj, havis planojn realigi la uzadon de la libera mono. La afero iris rekte al la labormerkata ministro, al la ministro por internaj aferoj kaj al la financministro de Vaŝingtono D.C. Neniu el tiuj estis kontraŭ la ideo, sed neniu el ili havis potencon doni la permeson, kiu estis bezonata por la realigado. Fine Dean Acheson (kiu poste fariĝis ŝtatsekretario) volis havi ekspertizon de sia konsilanto, la Harvard-profesoro Russel Sprauge, antaŭ ol li povis ion decidi. Cohrssen memoras ĉi tiun renkontiĝon kiel tre koran:

"Profesoro Sprauge diris al mi... ke principe estis nenio diri kontraŭ eldono de "poŝtmarkaj monbiletoj" cele krei laborokazojn. Sed nia plano iris multe pli longe: ĝi estis provo strukturŝanĝi la usonan monsistemon kaj li ne havis aŭtoritaton aprobi tian planon.Tio signifis la finon por nia "stamp-scrip"—movado kaj ankaŭ por modela provo, kiu fakte povus esti kondukanta al reformo de la monsistemo." [10]

La 4an de marto 1933 prezidento Roosevelt ordigis provizoran fermon de la bankoj kaj li malpermesis pluan eldonon de kriza valuto. Cohrssen finas:

"Mallonge ni povas diri ke la teknikaj problemoj, kiujn ni renkontus dum provo enkonduki stabilan valuton, ŝajnas malgrandaj kompare al la ĝenerala manko de kompreno de la problemo mem. Tiel longe kiel la "Moniluzio"... ne estas venkita estas preskaŭ neeble mobilizi la necesan politikan volforton por estigi ĉi tiun stabilecon."[11]

## La hodiaŭa solvo

Laŭ propono de Yoshito Otani[12] la teknika flanko de la problemo, t.e. tio pri "uzadkotizo", povus esti solvata en pli simpla maniero hodiaŭ - konforme al la hodiaŭa pagmodelo. 90% el tio, kion ni hodiaŭ nomas "mono" estas ciferoj en komputilo. Sekve ĉiuj povus havi du kontojn: unu por kurantaj en- kaj elspezoj kaj unu por ŝparado. La mono en la kuranta konto, kiu ja estus je libera dispono de la posedanto, estu traktata kiel kontanta mono kaj ĝi ne perdus pli ol 0,5% de la valoro pomonate, aŭ 6% pojare. Tiu kiu havis pli da nova mono en sia konto ol li aŭ ŝi bezonus por siaj elspezoj ĵus en tiu monato estus - per helpo de la eta kotizo - devigata transmeti la restantan sumon en la ŝparkonton. De tie la banko povus, por certa tempo, pruntedoni tiun monon, sen rentumo, al tiuj kiuj bezonus. El la ŝparkonto do *neniu* kotizo estu prenata.

Laŭ sama logiko la nova posedanto ricevu neniun renton de sia ŝparkonto - *sed la nova mono retenus sian valoron.* (Tuj kiam la rento estas forigata la inflacio fariĝos nenecesa. Vidu ĉapitron 1.) Tiu persono, kiu ricevas krediton ankaŭ ne bezonas pagi rentumon, sed tamen riskan sumon kaj bankkotizojn, kompareblajn kun tiuj kiuj hodiaŭ estas enkalkulitaj en ĉiu banka pruntepreno. Tiu sumo atingas 1,5% de la normalaj kreditkostoj (en Germanio) hodiaŭ.

Tre malmulte fakte estus ŝanĝita en la praktiko. Bankoj funkcius kiel ordinare, kun tiu ŝanĝo ke ili estus pli interesitaj pruntedoni monon, ĉar ankaŭ ili ja estus submetataj saman uzadkotizon kiel ĉiuj aliaj - se ili "sidus tro longe sur la mono". Por ekhavi bilancon inter la ŝparita respektive elpruntita mono eble necesus havi etan korektigan kotizon de plus/minus 1%. Se la banko sekve havus pli da nova mono en la ŝparkontoj ol ĝi bezonus, ĝi do pagu kotizon de 1%. Se la banko kontraŭe havus likvidan problemon ĝi ricevus respondan sumon. En tiu okazo la kotizo servu kiel reguliga mekanismo, kontraste al la nuna rentuma sistemo, kiu funkcias kiel

alidistribuanto de riĉecoj.

La bazo por tiu reformo estus sufiĉe preciza adaptiĝo de la cirkulanta monamaso al sumo necesa por daŭrigi ĉiujn komercajn transakciojn. Kiam oni produktis sufiĉe da mono bezonata por ĉiuj transakcioj ne estus necese produkti plian. Tio signifas ke la nova mono nun sekvus "naturan" fizikan progresmodelon (Bildo 1, kurbo a) anstataŭ la eksponencialan kurbon.

Alia teknika aspekto de tia monreformo estas ke ĝi malhelpas al homoj amasigi monon. Pli eleganta solvo ol surglui "poŝtmarkon" dorsflanken de monbileto estus presi diverskolorajn monbiletojn el kiuj oni povus retiri kelkajn seriojn dufoje jare, sen averto. Ne bezonus fariĝi pli multekoste por la registaro ol hodiaŭ, presi novajn monbiletojn, kiam la malnovaj estas eluzitaj.

Kiel la sperto montras, de kaj Aŭstrio kaj Usono, la politika aspekto devos esti konsiderata kiel determina faktoro rilate al la teknika. Tio estos traktata en ĉapitro 3.

Se la supre menciita monreformo plenumiĝus grandskale, reformo devus sekvi rilate terposedadon kaj impostojn. La unua por eviti, ke troaĵo da mono estu uzata por terspekulado. La dua por eviti eventualajn ekologiajn konsekvencojn pro ekonomia haŭso, kiun sekvus enkonduko de senrentuma mono.

## La bezono de terposeda reformo

Mono kaj tero estas du aferoj, kiujn ĉiuj bezonas. Aŭ ni manĝas, dormas aŭ laboras, la vivo estus neebla sen tero. La tero tial, same kiel aero kaj akvo, devus aparteni al ĉiuj. La indianoj de Nord-Ameriko diras: "La tero estas nia Patrino. Kiel ni povu disŝiri ŝin en pecojn kaj forvendi ŝin!" *La tero apartenu al la socio kaj estu forluata al tiuj, kiuj ĝin kulturas.* Tia ankaŭ estis la koncepto kaj la kutimo en multaj eŭropaj landoj ĝis la enkonduko de la

romana juro kun ties akcentado de privata posedrajto dum la malfrua mezepoko.

Hodiaŭ la mondo sin dividas en du diversajn sistemojn:
- privatan posedrajton kaj privatan kulturadon de la tero en la kapitalistaj landoj kaj
- kolektivan posedrajton kaj kolektivan kulturadon de la tero en la komunistaj landoj

En la kapitalistaj landoj la plimulto de la loĝantaro estas devigata pagi por la grandaj profitoj, kiujn sekvas la spekulado en tero (Bildo 7), ĝuste dum pli kaj pli da tero koncentriĝas al ĉiam malpli da posedantoj. En la komunistaj landoj kontraŭe estas la problemo la neekonomia uzado de kolektive posedata tero. En Okcident-Germanio ĉ 70% de la tero estas posedata de 20% de la loĝantaro. En Brazilo kaj aliaj kapitalistaj landoj en la tria mondo la terposedanta malplimulto estas nur 2-3% de la loĝantaro. La problemo en la kapitalistaj landoj tial estas la privata posedado.

En Sovet-Unio, aliflanke, kie la tero estas posedata kaj kulturata kolektive, 60% de la nutraĵoj estas produktataj en la 4%-a areo, kiu estas en privata kulturado. Tio signifas ke la problemo tie estas la kolektiva kulturado.

Sekve kombino de kolektiva kaj privata kulturado estus la plej favora solvo, kiam temas pri atingo de sociala justeco kaj samtempe permesi individuan kreskon. Estis ankaŭ ĝuste tio, kion proponis Henry George en 1879 [13], Silvio Gesell en 1904 [14] kaj Yoshito Otani en 1981.[15]

En la praktiko tio hodiaŭ signifus, ke socio - pecon post peco - foraĉetu la tutan teron kaj forluu ĝin al la enloĝantoj de la socio. (Parto de la tero al ties originaj posedantoj, aliaj partoj al novaj luantoj.) Landoj kun progresema konstitucio ne havus - leĝe rigardante - iajn problemojn realigi tian ŝanĝon. Okcidentgermana konstitucio ekzemple priskribas teron kiel posedaĵon, kies posedo postulas socialan respondecon. Sed tiu sociala

respondeco, eĉ hodiaŭ ne estas plenumita. Bildo 7 montras ke homoj devis labori averaĝe trifoje pli longe en 1982, ol ili faris en 1950 por pagi saman terpecon.

Neniu okcidentlanda nacio povus eĉ diskuti ŝtatan transprenon de tero - sen kompenco al la posedanto - post la katastrofaj efikoj tia eksproprietigo havis en landoj kun komunista regado. Malgraŭ ke la romana juro, sur kiu baziĝas la privata terposedado en la okcidenta civilizo antaŭ proksimume 300 jaroj estis altrudata al la popolo de iliaj konkerintoj, apartenas tiuj, kiuj - unue - profitis el ĉi tio, al la historio, kaj la hodiaŭaj terposedantoj aŭ leĝe aĉetis aŭ heredis la teron, kiun ili kulturas. Tial devos esti kompenso, se la socio volas krei pli justan situacion.


Longperspektiva solvo povus esti fiksi etan kotizon de 3% jare de la valoro de la posedata tero. Tiu kotizo estu pagata al la socio kaj ĝi poste estu uzata por aĉeti teron en la merkato. Tiamaniere la socio iom post iom akirus posedon super sia tuta terareo.

Alternativo estus ke la terposedantoj informiĝus, ke ili havus eblecon vendi sian teron al la socio anstataŭ pagi la kotizon. Ekzemple la kotizo de 3% povus esti forkalkulita de la "aĉetsumo", tiel ke - neŝanĝinte ian monon - la komunumo posedus la teron post 33 jaroj. Poste ili daŭre rajtus kulturi la teron, sed post ĉi tiuj 33 jaroj ili anstataŭe pagus jaran lukoston, kiu estus analoga al valoro de 3% de la tero, al la socio.

Tuja efekto de tia reguligo estus ke spekuladoj ĉesus. La plej granda parto de la tero, kiun la homoj hodiaŭ posedas - sen kulturi ĝin - estus oferata al vendado por eviti kontinuan malgrandiĝon de la valoro. Ĉar tiamaniere pli kaj pli da tero estus disponebla, la terprezo falus kaj pli da homoj havus la ŝancon utiligi la teron en produktiva maniero. Precipe en la evolulandoj tia ŝanĝo havus konsiderindan efikon. La granda problemo tie estas, ke la terkulturadaj rikoltoj ne sufiĉas por nutri la landan loĝantaron. Tio ne dependas - kiel multaj pensas - de

Bildo 7

## Por pagi konstrugrundon en okcidenta Germanio oni devas labori trifoje tiel longa tempo dum la 1980-aj jaroj kiel dum la 1950-aj jaroj.




Kial la konstrugrundoj ĉiam fariĝas pli multekostaj?
Kiu profitas el la nuna sistemo?
Kion necesas ŝanĝi por ke ni povu krei pli grandan egalecon?

malbone evoluinta terkultura tekniko, sed ĝuste de manko de tero de la malgrandskalaj terkulturistoj. Ĉu la luanto loĝas en evolulando ĉu en industriigita lando, li aŭ ŝi daŭre retenu ĉiujn favorojn ligitajn al moderna leĝofarado pri heredaĵo ankaŭ en la nova sistemo. Ili povos uzi "sian" teron kiel ajn, kondiĉe ke ili sekvas la leĝojn, kiuj ekzistas, kie ili loĝas. Ili povas konstrui sur la grundo. Ili povas vendi siajn domojn. Ili povas testamente transdoni siajn domojn al siaj infanoj kaj genepoj. Ili povas forlui ilin triavice - sen konsento de la posedanto - tiel longe kiel la novaj luantoj pagas la luon. Por eviti la neefikecojn de la planekonomio aŭ de la burokratecaj proceduroj oni povus decidi la ekzaktan lukoston per helpo de publikaj ofertoj, aŭkcioj aŭ similaj procedoj.

Tiu ŝanĝo forlevus, finfine, enorman ŝarĝon de la ŝultroj de la laboranta loĝantaro. Ĉar finfine ĉiam estas ili, kiuj pagas por ĉiu profito, kiu origine venas el spekulado. Estas fakte ĵus por spekulado tero ĉiam estis uzata. Realisma ŝanĝo al socie respondeca solvo tial devas ekstermi la spekuladon pri tero kaj mono. Denove mi volas diri ke la proponita solvo ne celas puni tiujn, kiuj hodiaŭ profitas de la nuna sistemo, sed la intenco estas malraide sed sekure meti finon al tiuj premisoj, kiuj permesas al malgranda nombro havi enormajn favorojn dum samtempe estas postulata, ke tiuj favoroj estu pagataj de la granda plimulto.

## Bezono de imposta reformo

Estas farita taksado, kiu montras, ke la duonon ĝis du trionoj de la nuna BNP de Okcident-Germanio oni povas karakterizi "duban" rilate la eblecojn subteni ekologie fortikan estontecon.[16] Por nuligi la obstaklojn kaj stimuli al pli granda produktado kaj plena dungiteco, per la proponitaj mon- kaj terreformoj, ni tial bezonos aldoni du ŝanĝojn rilate la manieron en kiu niaj impostoj estas fiksitaj:

1. ŝanĝo de enspezimposto al varoimposto kaj
2. impostado sur la kostoj por la medio inkludiĝas en ĉi tiu varoimposto.

Hermann Laistner[17], kiu detale klarigis ĉi tiun ideon en sia libro *Die Ökologische Wirtschaft* (La ekologia ekonomio), montras ke enspezimposto faras la laboron pli multekosta kaj tial eldevigas pli altan gradon de mekanizado. Tio siavice kaŭzas konsumadon de finhavaj disponeblaj rimedoj per fabrikado de pli kaj pli malmultekostaj konsumvaroj. Se oni anstataŭe metus imposton sur la varon, kaj en la impostsumo inkludu la mediajn kostojn por ĝuste ĉi tiu produkto, tiam la varoj fariĝus kompare pli multekostaj. Kombine kun pli malaltaj laborkostoj tio malpliigu la premon pri pli da aŭtomatigo kaj pli da homoj ekhavu laboron.

Ĵus nun la socio pagas duoble se iu laboristo estas ŝanĝita kontraŭ maŝino. Ĝi perdas la enspezimposton - ĉar la enspezo de la maŝino ne estas impostata - kaj poste pagas senlaborecan rekompencon al la maldungitaj laboristoj. Krome nun estas farata konsiderinda kvanto de neleĝa laboro cele eviti imposton. Se la enspezimposto nuliĝus, tiu ĉi ombro-ekonomio fine estu leĝa.

Tiu ĉi ŝanĝo ne kaŭzus ian malaltiĝon de la vivnivelo komence, ĉar prezaltiĝo de varoj estus bilancataj per senimpostaj enspezoj, sed ĝi kreus - finfine - tute alian kaj pli ekologian konsuman modelon. Homoj pripensus dufoje antaŭ ol ili havigus novan biciklon aŭ aŭton - se montriĝus multe pli koste ol ripari la malnovan.

Ŝanĝo de la imposta sistemo povos esti enkondukata etape kaj ĝi estus saĝa ankaŭ sen la mona kaj grunda reformoj. Ĝi apogus longan vicon da postuloj kaj proponoj pri ŝanĝoj, kiujn ekologoj prezentis dum la lastaj jardekoj. Sed se impostreformo estus kombinata kun la du ceteraj, tiam la rezulta ŝanĝo faru superfluaj multe da mediaj kaj rimedaj demandoj kaj protektaj direktivoj. Krome tio kontribuus al solvo de la senlaboreca problemo.

## 3. Kiu profitos de la nova monsistemo?

Ŝanĝo ene de individuo aŭ de socio ŝajnas okazi pro tri baze diferencaj kialoj:

ĉar katastrofo, pro certa kondutaro, *jam okazis*; oni sekve volas eviti ankoraŭ unu katastrofon;
ĉar katastrofo, pro certa kondutaro, *povus okazi*; oni sekve volas eviti katastrofon;
ĉar alia kondutaro *ŝajnas pli taŭga*, kiam oni pensas pri la dezirata rezulto.

Tiu ŝanĝo en nia ekonomia sistemo proponita en la antaŭa ĉapitro povus okazi pro kiu ajn de la supre menciitaj kaŭzoj, pro kombino de du el ili, aŭ de ĉiuj tri kune.

En malnovaj tempoj la kancersimila valorakumulado kondukis, kun regulaj intervaloj, al socialaj revolucioj militoj kaj ekonomiaj kolapsoj. Nuntempe tia solvo estas ne akceptebla pensante pri la amplekse nekompareblaj internaciaj ekonomiaj dependrilatoj en kiuj ĉiuj ŝtatoj nun vivas. Por ne mencii la grandan superkapaciton de ekstermiloj, kiuj nun ekzistas en nia mondo.Tio signifas ke ni devas serĉi novajn solvojn por eviti pli da militoj, socialaj revolucioj aŭ ekonomiaj kolapsoj.

Laŭ multaj specialistoj ene de ekonomio kaj bankismo la borsa kolapso en 1987 - kiam 1,5 trilionoj da dolaroj malaperis dum kelkaj tagoj - estis nur ondeto sur la surfaco kompare al la minacanta tutmonda Granddepresio II. Ĝi estas kalkulata plej altgrade probabla en la plej proksima estonteco, se ni ne efektivigas profundan ŝanĝon.[18] Ŝanĝi la ekonomian sistemon nun sekve donus al ni

eblecon eviti la grandegajn kostojn, home kaj materie, kiujn tia katastrofo kaŭzus.

Aŭ ni povas aŭ ne povas kompreni ke ĉiu eksponenciala kreskokurbo fine gvidos al sia propra pereo, la avantaĝoj de nova monsistemo estas tiel evidentaj por krei socialan justecon kaj ekologian ekvilibron, ke ni elektu tion tutsimple ĉar tio estas pli bona solvo ol tiu, kiun ni nun havas.

Kiel ajn, la plej granda problemo en profunda rekrea procezo estas ne tiel multe, ke ni volas resti kie ni estas, aŭ ke ni ne povas vidi la avantaĝojn de la alia stato. Ne, pli temas pri *kiel* ni venos tien de ĉi tie kaj de ĉi tiu trapezo al la alia sen riski la vivon?

Por faciligi la komprenon kiel tiu rekreo povos kontribui al atingo de la celoj de multaj diferencaj socialaj grupoj, ni rigardu kiel ĝi influus al riĉuloj *kaj* mizeruloj, al registaroj *kaj* individuoj, al malplimultoj *kaj* la plimulto, industriistoj *kaj* mediaj aktivuloj, materiistoj *kaj* spirite serĉantaj homoj. La interesa vero kiu ekaperas estas, ke - je tiu speciala historia okazo, je tiu krizsituacio, kiun ni mem kreis - *ĉiuj* profitus de nova monsistemo. Ni ĉiuj estus en profita pozicio se ni faras la necesan ŝanĝon nun.

Kiel Fritiof Capra rimarkigis, la ĉinoj ĉiam komprenis la dinamikon de la ŝanĝo pli bone ol ni okcidentuloj. Krizo estas por ili nur aspekto de ŝanĝoprocezo. La kriza simbolo de la ĉinoj, *weiji*, konsistas el la du signoj "risko" *kaj* "ŝanco".[19]

## Tiu lando aŭ tiu regiono kiu komencos.

Ĝis ĉi tiu parto de la analizo ni pritraktis faktojn, priskribojn kaj ciferojn kiujn kiu ajn povas kontroli. Ek de nun ni okupos nin per "inteligentaj divenoj" bazitaj sur spertoj faritaj pasintece. Ĉu ĉi tiuj supozoj estas validaj nur povos esti pruvite per provoj en la reala vivo.

La demando do estas: Kial iu regiono aŭ iu lando libervole "kandidatiĝu" kaj engaĝiĝu por esti provregiono por nova monsistemo?

Se nia analizo ĝis nun estas korekta la proponita solvo ofertas la sekvantajn gravajn avantaĝojn:

- la inflacio malaperos
- la sociala justeco pliiĝos
- la nombro da senlaboristoj malpliiĝos
- la prezoj de varoj kaj servoj malaltiĝos per 30-50%
- forta altkonjunkturo en la komenco
- kaj poste stabila ekonomio.

La ebleco investi kaj produkti sen bezoni pagi rentumon, ne nur malaltigus la prezojn de varoj kaj servoj ene de tiuj regionoj aŭ landoj, kiuj enkondukus la novan monsistemon, sed ankaŭ kreus eksterordinaran avantaĝon por industrioj kaj produktoj, kiuj konkurencas en la enlanda aŭ monda merkato. Ne gravas kiel alta aŭ malalta la aktuala rentumo estas, varoj kaj servoj povus esti vendataj multe pli malmultekoste. Pro tiu kaŭzo ekestus rapida ekonomia haŭso en tiuj regionoj, kiuj unue enkondukus la senrentuman monon.

En tiu subita ŝanĝo oni povas vidi maloportunaĵon, kiu estas minaco kontraŭ la medio. Ekster la ebleco krei pli bonan impostsistemon (kio antaŭe estas klarigita), ni tamen povas vidi la sekvan eblecon:

Multaj varoj kaj servoj, kiuj nun ne povas konkurenci kun tiu speciala talento reprodukti sin en la monmerkato, kiu mono havas, subite fariĝus ekonomie prosperantaj. Inter tiuj estus multaj ekologiaj produktoj, socialaj projektoj kaj artaj eksperimentoj, kiuj ofte estas je la "trapenetra limo", ĉar ili ofertas kontentecon en homaj termoj. Tio rezultigus pli multfacetan kaj stabilan ekonomian bazon, kiu vere ne estus minacanta la medion.

La nombroj de senlaboreco malaltiĝos kiam la ekonomiaj aktivecoj ekfloros. Tiamaniere la bezono malpliiĝas

pri diversaj formoj de socialaj subvencioj kaj per tio ankaŭ pri kreskanta burokratismo kaj pli altaj impostoj.

Se la reformo estos realigata en *aparta regiono* oni bezonus tie enkonduki aŭtomatan akcepteblan ŝanĝokurzon por faciligi la komercon inter ĉi tiu regiono kaj la aliaj en la lando. Ĝis la nova monsistemo estos akceptita tutlande, kelkaj reguloj povus esti necesaj, kiel protekto kontraŭ spekuladoj en negocaj transakcioj.

Se la reformo estos realigata en *tuta lando* la komerco kun aliaj landoj daŭrigu same kiel hodiaŭ. Daŭre ekzistus ordinara ŝanĝokurzo. Ĝenerale vidate la "stabila mono" tamen altirus pli altajn ŝanĝokurzojn dum la daŭro de la jaroj, ĉar ĝi ja ne estus devalutigata pro inflacio. Tial investoj en tiu mono povus fariĝi sufiĉe favoraj kompare al tiuj valutoj, kiuj varias en valoro, kiel la dolaro hodiaŭ.

Sammaniere kiel en Wörgl, priskribita supre, estus ankaŭ eble por du monsistemoj ekzisti flanko ĉe flanko. Ni povus reteni la hodiaŭan sistemon kaj samtempe enkonduki la novan monon en malgranda regiono aŭ urbo. Laŭ la "leĝo de Gresham" "malbona" mono forprenos "bonan". Kion ni ĵus kreis ĉi tie estas - en tiu signifo - "malbona" mono, ĉar ĝi ja submetiĝos uzkotizon diference al la hodiaŭa mono. Ĉie, kie homoj povas pagi per "malbona mono", ili uzas ĝin kaj retenas la bonan monon. Tiamaniere la nova mono estos uzata ĉie kie eblas kaj tio estas precize kion ni celas. La malnova mono estos ŝparata kaj uzata nur kiam estos necesa. Tial la proponita monsistemo - se ĝi komence enkondukiĝis prove en speciala regiono - povus kunekzistadi kun nia nuna sistemo ĝis la nova pruvis sian taŭgecon.

## Registaroj, politikistoj, bankposedantoj kaj ekonomikistoj

En la plej multaj landoj la ŝtata registaro havas la monopolon eldoni monon. Tio signifas ke kiu ajn provo - eĉ sur pli malalta regiona nivelo - devas havi apogon de la registaro. Tute evidente enkonduko de nova mono fariĝus, en plej alta grado, politika demando. Estos postulata kuraĝon de registaro rekoni, ke sistemo de tia maljusteco tiel longe toleriĝis. Aliflanke estas tamen malfacile por la plej multaj kompreni kial "kotizo" de mono estus pli bona solvo ol la hodiaŭa rentosistemo. Ŝajnas same malfacile kompreni kiel ke la suno ne rotacias ĉirkaŭ la tero - sed ke fakte la tero rotacias ĉirkaŭ la suno. Ni scias ke tio estas vero, sed ankoraŭ havas malfacilaĵojn fari al ni klaran bildon de tio.


Momente ni postulas klarigojn de ŝtatestroj, politikistoj, bankistoj kaj ekonomikistoj pri la problemoj kaŭzitaj de la fundamenta eraro en la monsistemo. Ilia respondo estas: simptomkuracado kaj balzamo-al-la-vundo-solvoj. En la porelektaj kampanjoj ĉiame aŭdiĝas la revenanta promeso kontraŭbatali la inflacion, plibonigi la socialan priservadon, apogi naturprotektajn interesojn kaj respekti la vivmedion.

La vero estas ke ili batalas per la dorso kontraŭ la muro kaj ke la situacio ne pliboniĝas sed male, fariĝas pli kaj pli malbona kiam ni alproksimiĝas al la akcelada fazo en la eksponenciala kreskokurbo en nia ekonomia sistemo. Anstataŭ prikalkuli plibonigojn en la sociala priservado aŭ pri mediaj demandoj, estas ja ĵus en tiuj sferoj la budĝetaj reduktoj unue estas aktualigitaj. Aŭ la politikistoj apartenas al la konservativa aŭ la radikala falango la spaco por realaj ŝanĝoj vere estas malgranda ene de la nuna sistemo.

Bildo 8 montras kial fariĝos tiel. En kiu ajn forte deferencigita ekonomio unu sektoro estas intime

Bildo 8

## Kial la ekonomio fiksiĝas en la raddentoj?




Ĉu tiu problemĉeno povos rompiĝi?
Kiu tiaokaze enmiksiĝu?
Kio bezonos esti ŝanĝita en la cirkula mekanismo?

---

kunligita kun alia. Se ni de unu sektoro forprenus pli ol ĝia parto, tiam ni nepre kaŭzu problemojn - ne nur tie sed ankaŭ en la aliaj sektoroj. Se la ŝuldoj de la ŝtato pligrandiĝas kaj la rentumo altiĝas, tiam alfluos pli da mono al la kapitalposedantoj. Samtempe havos tiuj, kiuj laboras, malpli da mono por konsumado. Tio siavice


kaŭzos fluktuadojn en la merkato kun sekvaj problemoj pri laborokazoj k.t.p. Registaroj, kiuj provas plenigi la ŝtatenspezojn per pliigo de siaj ŝuldoj, faras la "problemĉenon" ĉiame pli longan. La nova monsistemo helpus malpliigi la misproporcian kreskon de la ŝuldoj, same kiel la koncentradon de kapitalo. Tio ankaŭ certigu konstantan interŝanĝon de varoj kaj servoj en libera merkato.

Se ni nun opinias ke la situacio ŝajnas malfacila en la industriigitaj landoj, ni devas esplori kiel estas en la tria mondo, kiu devas preni la plej terurajn konsekvencojn de la hodiaŭa sistemo. Dum grandaj usonaj kaj germanaj bankoj pligrandigas siajn rezervojn, por esti preparitaj por la financa kolapso de siaj prunteprenantoj en la evolulandoj, la industrilandoj importas kapitalon de la evolulandoj - ne male. Per eksportado de novaj pruntedonoj kiel helpo amortizi la malnovajn, ili pligrandigas la internacian ŝuldokrizon. Ke tiu tendenco devos esti ŝanĝita oni evidente rimarkas en la UN-raporto de la Monda Komisiono por medio kaj evoluo, kun la nomo *Nia komuna estonteco*. Ĝi ankaŭ pruvas ke la ŝajne apartaj krizoj en la monda ekonomio, kaj en la ekologio de nia planedo, fakte estas nur unu sola.

"Ekologio kaj ekonomio estas iĝantaj pli kaj pli kunteksitaj - loke, regione, nacie kaj tutmonde - al senkudra teksaĵo de kaŭzo kaj efiko... Ŝuldoj, kiujn ili ne kapablas sed devas pagi, devigas al afrikaj landoj, kiuj dependas de krudaĵvendado, troekspluati siajn difektiĝemajn grundojn, kio rezultigas, ke bonaj grundoj transformiĝos en dezertojn... La produkta bazo en aliaj evoluregionoj en la mondo estas trafita en simila maniero de kaj lokaj malsukcesoj kaj influo de la internaciaj ekonomiaj sistemoj. Kiel sekvo de la ŝuldokrizo de Latinameriko oni hodiaŭ uzas la naturrimedojn de ĉi tiu kontinento ne por evoluo sed por pagi al eksterlandaj pruntodonantoj. Tiu ĉi maniero ataki la ŝuldoproblemon estas el pluraj vidpunktoj senpripensa: ekonomie, politike kaj medie. Tio devigas relative malriĉaj landoj akcepti kreskantan malriĉecon samtempe kiel oni eksportas

Bildo 9


## Okcidenta Germanio 1950 - 1985




*La nacia ŝuldo kreskis*
*51-oble*



*BNP kreskis*
*18-oble*




*La banktransakcioj*
*plialtiĝis*
*83-oble*

De kie devenas tiu nenatura ekspansio en la financa sektoro?
Kiuj estas la konsekvencoj por la socio?
Kion ni povos fari por malaltigi la malekvilibron?

---


amasojn da siaj malabundaj rimedoj... Tiu malegaleco estas la plej grava media problemo de la mondo. Estas samtempe la plej grava evoluproblemo."[20]

Je tiu tempo, diras Alfred Herrhausen, direktoro de la plej granda banko de Okcidentgermanio (Deutsche Bank), "la strukturo kaj la grandeco de la problemo defias la tradiciajn teknikojn por problemsolvoj".[21]

Bildo 10

**Ĉu vi iam vidis monon labori?**

**Mono devas labori-
por bona profito!**




**Averaĝe laboras 200 000 g.m. por ĉiu dungito**

Kiel oni povas eligi pli da mono el mono?
Kiu donas sian kontribuon al la produktado?
Kiu profitas de tio, ke mono "laboras"?

---

Tiuj homoj, kiuj praktikas la hodiaŭan monsistemon scias, ke ĝi ne povas daŭri, sed aŭ ili ne konas ian alternativon aŭ ili ne volas scii pri iu. Bildo 9 donas almenaŭ unu klarigon al tio. Kompare al la brutta nacia produkto kaj la kreskanta grandeco de la ŝtata ŝuldo la bankoj ricevis misproporcian parton de la nacia riĉeco.

Parte tio dependas de tio, ke la bankoj ĝuas pli malaltan rentumprocentaĵon kaj sekve eblecon al pli granda profito ol aliaj, sed ankaŭ de la plialtigita spekulado pri mono, kio siavice kondukas al plialtigitaj makleraĵoj. Tiuj bankoficistoj, kun kiuj mi diskutis ĉi tiun temon, ne konis ian alternativon. Post kiam mi klarigis la novan monsistemon kaj ĝiajn eblecojn al ili, ili ofte sentis ke ili ne povis pluperi la scion sen riski siajn laborojn.

La bankoj ne interesiĝas pri malferma diskuto pri la funkciado de la rentosistemo, se ili ne akceptas longperspektivan rigardmanieron. Momente ili prefere faras male. Bildo 10 montras kelkajn misgvidajn rubrikojn, kiuj revenas en la anoncoj de la bankoj, en revuoj kaj ĵurnaloj en la tuta mondo. Mono - la bankoj opinias - povas "kreski", "plimultiĝi", multobliĝi". Plejofte ili provas supervinki homojn ke mono povus "labori" por ili. Tamen neniu homo vidis monon labori. Laboro ĉiam plenumiĝis de homoj, kun aŭ sen maŝinoj.

Tiu tipo de anoncoj kovras tiun fakton ke ĉiu krono aŭ dolaro, kiu iras al la investisto estas rezulto de la streĉo de alia homo, de kiu tiu sumo estas prenita, kiel ajn tio okazas. Homoj, kiuj laboras por sia mono fariĝas alivorte pli malriĉaj samgrade kiel ili, kiuj posedas monon pliigas siajn investojn. Tio estas la tuta mistero pri kiel mono "laboras", kion la bankoj ne volas ke estu malkaŝita.

Laŭ mia sperto tiuj personoj, kiuj devus esti konsciaj pri la problemo kaj ĝia solvo, t.e. ekonomikistoj en la tuta mondo, timas esti fimontritaj kiel "radikalaj". Ili ja vere, fare de apogo de la ideo pri senrentuma mono, povus provi veni al la radiko (en latino = radix) kun unu el la plej premaj ekonomiaj problemoj de la mondo. Sekve Gesell kaj lia teorio pri "natura ekonomia ordo" estas traktata de la ekonomikistoj kiel unu el la multaj malsukcesaj provoj de la historio realigi socialan reformon.

Kelkaj el la grandaj personecoj dum nia jarcento, Albert Einstein, John Maynard Keynes kaj Ezra Pound, klare

vidis kiel gravaj la teorioj de Gesell pri reformo de la monsistemo estis. Keynes opiniis fakte en 1936 ke "la estonteco pli lernos de la spirito de Gesell ol de Marx".[22] Tiu estonteco tamen ankoraŭ ne komenciĝis, malgraŭ ke bankistoj kaj ekonomikistoj ne bezonus esti troige antaŭzorgaj por kompreni ke nova monsistemo ebligus al ili solvi la centralan dilemon, pri kiu ili baraktis dum jardekoj. Anstataŭe estas kiel la gvida ekonomihistoriisto John L King diras en sia libro "*On the Brink of the Great Depression II*" (Ĉe la rando de la Granddepresio II):

"Ilia cifermuelado kaj komputiligitaj formuloj montriĝis esti komplete senrilataj kaj tial ankaŭ iliaj antaŭdiroj fariĝis eksterordinare eraraj. Estas kvazaŭ ni edukus tiujn homojn al trans ilian kapablecon pensi".[23]

Mi notis ke ekonomikistoj - diference al la plej multaj inĝenieroj - ne tute komprenas la danĝeron, kiu estas en eksponenciala kresko. Ili eble povas vidi ĝian riskon rilate la disvastigon de AIDS aŭ kiam temas pri "la loĝantara eksplodo". Ene de sia propra sfero ili kontraŭe ŝajnas preskaŭ blindaj kaj naive kontentaj doni iom da simptoma kuraco tie kaj ĉi tie, kaj poste kredas ke tio montriĝos sufiĉe por malpliigi la danĝeron.

Tiuj registaroj, kiuj tenus sin pozitivaj al enkonduko de la monreformo post nelonga tempo prenus grandan paŝon en la direkton al sociala egaligo, ekologia travivado kaj sanigado de tiuj monmalsanoj, kiuj infektis la t.n. "liberajn merkatekonomiojn" dum jardekoj.

## La riĉuloj

Unu el la kritikaj demandoj, kiun ĉiam faras tiuj kiuj ekkomprenas la efikecon de la kaŝita alidisdivida mekanismo ene de nia nuna monsistemo estas jena: Ĉu tiuj 10% de la loĝantaro, kiuj profitas el la hodiaŭa sistemo, permesos ian ajn ŝanĝon, kiu forigus iliajn eblecojn de neperlaborita enspezo - prenita de la granda plimulto da homoj?

La respondo de la historio estas: Kompreneble ne - nur se ili estos devigataj al tio de tiuj, kiuj pagas. La respondo de la nova epoko estos: Kompreneble ili faros tion - se ili konsciiĝos ke "la branĉo, sur kiu ili sidas, kreskas sur malsana arbo" kaj ke ekzistas "sana alternativa arbo", kiu ne kolapsos pli aŭ malpli frue. La dua respondo signifos socialan evolucion - la mildan vojon. La unua signifos socialan revolucion - la malmildan vojon.

La milda vojo proponas al riĉaj homoj la eblecon *reteni tiun monon, kiun ili profitis el la rentosistemo.* La malmilda vojo sekvigos rimarkindajn malprofitojn.

La milda vojo estas nenia akuzo al tiuj, kiuj profitis el la rentosistemo, ĉar ilia agado nune - kaj ĝis ni enkondukis la novan monsistemon - estas tute laŭ la leĝo. La malmilda vojo kun sociala revolucio estos certe pli dolora.

La milda vojo signifas: ne plu senlabora enspezo, sed stabila valuto, pli malaltaj prezoj, eventuale ankaŭ pli malaltaj impostoj. La severa vojo signifas kreskantan maltrankvilecon, nestabilecon, pli altan inflacion, pli altajn prezojn kaj pli altajn impostojn.

Mia ĝisnuna sperto pri la 10% plej riĉaj homoj estas, ke ili nek estas komplete konsciaj pri kiamaniere la rentosistemo vere funkcias, nek ke troviĝas iaj realecaj alternativoj. Kun tre malmultaj esceptoj ili pli emus elekti sekurecon ol pli da mono, ĉar ĝenerale ili havas sufiĉe por si mem kaj kelkfoje ankaŭ por multaj estontaj generacioj.

Sekvanta demando estas: Kio okazos, se tiuj homoj transigos sian monon al aliaj landoj, kie ili ricevos renton anstataŭ meti ĝin en siajn bankkontojn, kie ĝi konservos sian valoron, sed ne akumulos renton? La respondo estas, ke ili, ene de mallonga periodo, post kiam ni enkondukis la reformon, eble faros precize male. Ĉar la profitmarĝeno inter tio, kion homoj profitus elkapi-

talrento, post depreno de la malpli-valoriĝo pro inflacio kredeble estu proksimume same kiel la plivaloriĝo de la nova seninflacia mono.

Fakte la risko povas esti la rekte kontraŭa. Tio, kion ni kreos, estos "Supersvislando" kun stabila valuto kaj prosperanta ekonomio. Nuntempe inventistoj pagas por meti sian monon en bankkonton en Svislando sen rento. Menciinda kontrasto estas ke Usono, dum la pli frua periodo de Reagan, ofertis la plej altajn rentoprocentaĵojn kaj tiamaniere tiris al si superfluan monon el la tuta mondo. Baldaŭ ili ankaŭ estis devigataj devaluti por povi plenumi siajn ŝuldojn al la pruntedonantoj eksterlande. Je rentoprocentaĵo de 15% (kiu estis la aktuala rento en la komenco de la altrenta periodo) Usono post 5 jaroj estus devigata repagi duoble tiun sumon, kiun la pruntedonantoj investis. Ekzistis neniu ajn maniero ordigi tion, se la dolaro estus konservata sian originan valoron. Ankoraŭ sekvo de tiu ĉi politiko estis, ke Usono, dum periodo de 8 jaroj, aliiĝis de la plej granda kreditdonanto de la mondo al la plej ŝuldoŝarĝita nacio de la mondo.

Troviĝas granda sumo da mono por spekulado - taksita je 50 miliardoj da dolaroj - kiu rondiras la mondon de unu bankcentrejo al alia, serĉante profitdonajn kapitalinvestojn. Tio montras ke estas manko de saĝaj investeblecoj pli ĝuste ol manko de mono. Tiu cirkonstanco ŝanĝiĝus en tiu regiono aŭ tiu lando, kiu enkondukus senrentuman monon. Ĝi anstataŭe kreus altan konjunkturon, kiu iom post iom transirus al stabila kaj diferencigita ekonomio. La ŝanco estas pli granda, ke troaĵa mono de ekstere investiĝus ĉi tie ol ke interna troaĵa mono forlasus la regionon.

Tial; laŭ multaj konsideroj, estus pli profitdona por riĉuloj subteni monreformon kaj apogi stabilan sistemon ol apogi kreskantan nestabilecon kaj riski la neeviteblan kraŝon.

Tria demando koncerne la plej riĉajn 10 % de la loĝan-

taro temas pri tiuj, kiuj vivas el sia kapitalo kaj estas tro maljunaj por labori. Kio okazos al ili, se ni forigos la renton?

Ekzemplo, prenita de Okcidenta Germanio (esprimita per mezprocentaĵo de rentumo kaj inflacio), montras ke tiuj, kiuj nun povas vivi el sia rento, povos vivi el sia kapitalo almenaŭ dum unu generacio - eble du aŭ tri - venonte. Se ni supozas ke ili havas kapitalrimedojn de 1000 000 da markoj, kun renta procentaĵo de 7% kaj inflacia rapideco de 3%, tiam la kapitalrento estos 40 000 markoj pojare, sen konsumadi la kapitalon.

En la nova monsistemo, kie ni forigos la renton kaj la inflacion la prezoj de ĉiuj varoj kaj servoj, kiel ankaŭ la imposto, malaltiĝos je proksimume 40%. Tio signifas ke sama persono bezonos malnetan enspezon de 26 000 germanaj markoj jare por povi reteni saman vivnivelon kiel nun. Se ni dividas 1 000 000 per 26 000 ni ja vidas ke li aŭ ŝi povos vivi 40 jarojn el sia kapitalo.


La rafineco de tiu ekzemplo estas, ke la plej multaj, kiuj hodiaŭ povas vivi el sia kapitalo ankaŭ estonte povas fari tion, almenaŭ dum sia propra vivodaŭro, se ni ŝanĝus la sistemon.

Inter la plej riĉaj 10% el la loĝantaro estas tiuj, kiuj perlaboras 1 milionon da markoj. Sed estas ankaŭ kelkaj, kiuj ĉiutage gajnas pli ol 1 miliono da markoj el rento. Laŭ oficialaj fontoj[24] la ĉiutaga enspezo de la angla reĝino, la plej riĉa virino de la mondo, estis 700 000 pundoj (ĉirkaŭ 2 milionoj da germanaj markoj aŭ ĉirkaŭ 7 milionoj da kronoj) dum la jaro 1985. Malgraŭ ke nek la reĝino nek entreprenoj kiel Siemens, General Motors aŭ Volvo havas grandan oficialan potencon, ilia posedo de riĉaĵoj tamen rezultigas neoficialan potencon.

Skandaloj temante pri ke gvidaj industrioj financas politikajn partiojn en Okcidenta Germanio, Usono kaj aliaj okcidentaj landoj, pruvis, ke ĉiuj demokratioj estas

Bildo 11

## La divido de la mona bonstato en Okcidenta Germanio




Al kiu duono vi apartenas?
Kiel evoluas tiaj diferencoj?
Kiujn konsekvencojn havos tia monkoncentrado?

en danĝero, kiam la ekonomia alidisdivida mekanismo (t.e. la rento) estas permesata libere furiozi. La homoj, kiuj opinias sin vivi en demokratioj, iom post iom konstatos, ke ili en plej bona okazo vivas en oligarkioj - aŭ en plej malbona okazo sub faŝismaj reĝimoj. Dum mezepoka tempo homoj opiniis, ke ili estis en malfacila situacio, kiam ili estis devigataj pagi sian dekonaĵon: unu dekono de sia enspezo aŭ produktkvanto al la feŭdmastro. Rilate tion ili havis pli bone ol ni. Hodiaŭ pli ol unu triono de ĉiu

marko, dolaro aŭ krono translokiĝas en la poŝojn de la kapitalposedantoj.

La demando nun estas se ni finfine volas kompreni tiun socialan maljustecon, kiun nia nuna monsistemo kaŭzas - kaj ŝanĝi ĝin. Aŭ ĉu ni volas atendi krizan momenton, t.e. mondvasta ekonomia aŭ ekologia katastrofo, milito aŭ revolucio. Ĉar ne ekzistas ia maniero por unuopuloj aŭ etaj grupoj sole ŝanĝi la monsistemon, ni devas provi kunvenigi tiujn, kiuj scias kiamaniere ŝanĝo povos okazi kun tiuj, kiuj havas potencon ŝanĝi. Tiam estas evidente ke:

- tiuj kiuj profitas el la hodiaŭa sistemo, pere de la rento, povos neniel esti akuzataj por tio, ĉar ili agis ene de la limoj de la leĝo;
- tio kio male estos haltigebla estas la senĉesa eltirado de mono sen laboro;
- ne estu iaj malhelpaĵoj rilate kiel kaj kie posedantoj de kapitalo investu ĝin en la estonteco; se ili estas inteligentaj ili tamen retenos la monon en la lando, kiu kreos ekonomian altkonjunkturon pro la nuligo de la rentuma sistemo.

## La malriĉuloj


En 1986 ĉiu familio en Okcidenta Germanio posedis privatan kapitalon averaĝe de 90 000 markoj. Tio ja estus brilanta pruvo pri la bonstato de la lando - se ĝi estus disdividita almenaŭ iom egale. La malnobla fakto tamen male estas tia, ke unu duono de la loĝantaro posedas entute 4% de la kapitalo, kaj la alia duono posedas 96% (Bildo 11). Por esti pli ekzakta: la kapitalo de la lastaj 10 % kreskas konstante je kosto de ĉiuj aliaj.

Tio klarigas kial ekzemple familioj el la malsupra meza klaso en Okzidenta Germanio pli kaj pli serĉas ekonomian helpon ĉe socialaj instancoj. La senlaboreco kaj la malriĉeco kreskas spite de ampleksa reto de sociala pri-

Bildo 12

**Kiam mankas mono la rentumo altiĝas, kio siavice kaŭzas kreskantan senlaborecon kaj bankrotojn.**

Ŝanĝo de la rentumo estos rimarkebla nur post unu aŭ du jaroj en la senlaboreca statistiko.




Kial ni perdas la laborojn kiam la rentumoj estas altaj?
Kio kreas ĉi tiujn interligojn?
Kiel la situacio povas esti ĝustigita?


---

zorgado por ĝustigi ambaŭ.

*La plej grava faktoro rilate al alidisdivido de riĉaĵoj estas la rentumo, kiu ĉiutage transigas 1.100 milionojn da markoj de tiuj, kiuj laboras al tiuj kiuj posedas kapitalon.* Eĉ se la plej multaj registaroj provas ĝustigi la akompanantan malekvilibron per imposta sistemo, la

Bildo 13

## Subvenciado




*Ĉiutage*
*La Tria mondo pagas*
*200 milionojn da dolaroj de rentumo al ni*

Nia subvenciado estas nur duone tiel granda!
Kiel longe tio povos daŭrigi?
Kiel ni povas malpliigi la ekspluatadon de la malriĉaj landoj?

---


rezultoj nenie estas en la proksimeco de ekvilibro. Krome la kostoj de kreskanta burokratismo trafas ĉiujn pro plialtigitaj impostoj. Homaj kostoj en formo de tempo kaj energio - kaj la humiliĝo kiu sekvas la klopodojn traigi la burokratan regulsistemon - ne estas konsiderataj en la kalkulado.

La absurdeco de monsistemo, kiu unue deprenas de

Bildo 14

## La Tria mondmilito jam komenciĝis.

ekonomia milito, nedeklarita milito:
milito per uzuraj rentumoj, altegaj
prezoj kaj neegalaj ŝanĝkondiĉoj.
Rentumoj, kiuj estas kontrolataj de
fora loko ĝis nun mortigis milionojn da
homoj sur prirabita planedo. Ili mortas
pro malsato, malsanoj, senlaboreco kaj
krimeco.



Ĉu ni devos elteni ĉi tiujn cirkonstancojn?
Ĉu la revolucioj de la historio donas bonajn
proponojn de solvado?
Kiuj estas la veraj kaŭzoj de milito?

---

homoj ilian laŭleĝan parton de "la libera merkat-ekonomio" kaj poste - pere de la plej neperfektaj proceduroj - repagas parton de tiu mono en formo de sociaj subvencioj al samaj homoj, estas malofte malkaŝita de "ekspertaro" aŭ pridiskutata de la ĝenerala publiko. Ĉu povas esti aliel, tiel longe kiel tiuj 80% de la loĝantaro, kiuj pagas, ne komprenas kiamaniere tio okazas?

Efektiva komparo inter suprenirantaj rentumaj normoj kaj plimultiĝantaj nombroj da bankrotoj same kiel senlaborecaj nombroj, kiuj sekvas unu la aliajn kun postresto de unu ĝis du jaroj, donas al ni ankoraŭ unu konvinkan argumenton por enkonduki senrentuman monsistemon. Denove mankas en tiuj ciferoj socialaj kostoj, kiel alkoholismo, disigitaj familioj kaj plivastiganta krimeco, sed estas kromkostoj, kiuj efike povus esti reduktitaj per monreformo.

Se ni rigardas la dilemon de la tria mondo (Bildo 13) ni tiam vidas nian propran situacion kvazaŭ tra lupeo. Estas kiel karikaturo de tio, kio okazas en la industrie evoluintaj landoj, kaŭzitaj de la sama struktura difekto en la monsistemo. Tamen la granda diferenco estas ke la industriaj landoj kiel tutaĵo gajnas dum la evolulandoj pagas. Ĉiutage ni ricevas 300 milionojn da dolaroj el kapitalrentoj de landoj en la tria mondo; tio signifas duoble kaj eĉ pli tiel multe kiel la evoluhelpo, kiun ni donas al ili.

El la tuta ŝuldo de 1 000 miliardoj da dolaroj de la tria mondo en 1986, proksimume triono konsumiĝis por pagi rentumojn de antaŭaj prunteprenoj. Estas nenia espero ke tiuj landoj iam povus eliri tiun ĉi situacion sen grandampleksa krizo aŭ radikala politika ŝanĝo. Se milito signifas malsaton, malsategon kaj morton, socian kaj homan mizeron, tiam ni estas meze en la "tria mondmilito" (Bildo 14). Estas ne deklarita milito. Estas milito kies armiloj estas uzuraj rentumoj, manipulitaj prezoj kaj maljustaj interŝanĝaj kondiĉoj. Estas milito, kiu devigas homojn en senlaborecon, malsanon kaj kriman konduton. Ĉu ni devas permesi tion eterne?

Estas ne dubo ke tiuj homoj, kiuj nuntempe vivas plej malbone en tiu monsistemo, kiun ni kreis, estas pli ol la duono de la monda loĝantaro. La situacio en la tria mondo tuj aliiĝus se iliaj prunteprenoj povus esti nuligitaj, tute aŭ parte, de pruntedonantaj nacioj kaj bankoj. Tio estas ofte rekomendita de progresemaj ekonomikistoj kaj okazas fakte ofte jam nun. Tamen, se ne la baza difekto

de la monsistemo estas forigita la sekvonta krizo jam estas enprogramita. Unu el la plej gravaj paŝoj, kio nun estas necesa fari, estas konatigi la elekteblecon de nova monsistemo inter tiuj, kiuj plej profitus de ĝi: la malriĉuloj kaj la evolulandoj.

## La eklezioj kaj novspiritaj grupoj

Multaj el la grandaj politikaj kaj religiaj gvidantoj kiel Moseo, Jesuo, Muhameto, Luther, Zwingli kaj Gandhi provis malpliigi la socialajn maljustecojn malpermesante rentumpagojn. Ili komprenis la kernon de la problemo. Tamen ili neniam havis praktikan solvon proponi, kaj tial la fundamenta eraro restis neŝanĝita. La malpermeso de la papoj pagi rentumon en la kristana paroĥo dum la mezepoko en Eŭropo nur transdonis la problemon al la judoj, kiuj fariĝis la gvidaj bankieroj de la mondo. Malgraŭ ke la judoj ne rajtis preni rentumon unu de la aliaj, ili povis fari tion de la kristanoj. Interne de islamo oni ne pagas rentumon de monprunto, sed la pruntodonanta persono aŭ la banko fariĝas kunposedanto de iliaj negocoj aŭ ricevas parton de la venontaj profitoj. En certaj okazoj tio povas funkcii pli bone - en aliaj pli malbone - ol pagi rentumon.

Nuntempe la eklezioj lacigas siajn anojn per admonoj pri donacoj por mildigi la plej terurajn socialajn problemojn, en la industrilandoj kiel ankaŭ en la evolulandoj. Tio restos simptoma kuracado tiel longe kiel la sistema difekto en nia monsistemo daŭre efikas.

Kio anstataŭe estas bezonata estas disvastigo de informoj kaj malferma diskuto pri la efikoj de la nuna sistemo kaj pri la solvo en formo de monreformo.

En Latinameriko ekzemple la katolika eklezio estas disduiĝinta inter la konservativa hierarkio en la pinto, kiu tiriĝas al okcidentlanda formo de kapitalismo, kaj la progresema bazo, kiu orientiĝas al la komunista modelo.

Ni nun havas historian ŝancon prezenti senrentuman ekonomion kiel solvon en tria nivelo, nek komunista nek kapitalista, sed kiu leviĝas super ili ambaŭ Ĝi kreos stabilan ekonomion kaj proponos al la eklezioj valoran helpon en iliaj streĉoj alporti pacon al la tero.

En spiritaj terminoj ĉio, kion ni trovas en la mondo ekster ni, estas speguliĝo de nia propra interna mio, nia kredsistemo, niaj deziroj kaj niaj pensoj. Transformigo de la ekstera mondo postulas transformigon de la interna. Fari la unuan sendepende de la alia estas neeble.

La elkresko de esotera scio kaj ĝia praktikado multloke en la mondo montras al ĝisfunda konscienca ŝanĝiĝo ĉe pli kaj pli granda parto de la monda loĝantaro. Ilia laboro pri interna ŝanĝo donas al ni la bazon por ekstera ŝanĝo. Sen tiu laboro paca transformiĝo de la monsistemo estos neebla. Tial granda respondeco kuŝas sur tiuj, kiuj laboras por humanecaj celoj kaj estas konsciaj pri tiuj praktikaj eblecoj, kiujn monreformo povus havi kiel aspekto de tutmonda ŝanĝiĝo.


## La komerca kaj industria mondo

En senrentuma kaj seninflacia ekonomio la prezoj de varoj kaj servoj, same kiel en la hodiaŭaj kapitalistaj landoj, estus regulitaj per proponado kaj postulado. Kio male estus ŝanĝita estas la misprezento de "la libera merkato" pere de la rentomekanismo.

Averaĝe ĉiu laborloko en Okcident-Germanio portas ŝuldoŝarĝon de 70 000-80 000 markoj. Nur la rentumo sumiĝas je 23% de la meznombraj laborkostoj[25] (vidu bildo 15). Al la parto de rentumo de prunteprenita kapitalo oni devas aldoni rentuman parton de la propra kapitalo de la firmao. La lasta sin formas laŭ sama rentuma skalo kiel la unua. Tial ŝuldoj pliiĝas 2-3 foje pli rapide ol la landa ekonomia produktiveco (vidu bildo 5). La proporcioj ĉiame fariĝas pli kaj pli malbonaj por tiuj, kiuj laboras kaj por

Bildo 15

## La labora prezo estas pli ol nur la salajro




*Por ĉiu 100 GM, kiuj estis elpagita kiel salajro en 1985.....*

*... ĉiu industria kaj komerca entrepreno devas pagi ankoraŭ 23 GM de rentumo*

De kie devenas ĉi tiuj aldonaj kostoj?
Kiuj estos la konsekvencoj?
Ĉu ni povos ŝanĝi la proporciojn?

---

tiuj, kiuj volas starigi propran entreprenon.

Momente ni vidas evoluon de pliigita koncentrado en la industria sektoro. Malgrandaj komercaj entreprenoj kaj industrioj estas foraĉetitaj de la pli grandaj kaj la grandaj estas foraĉetitaj de la ankoraŭ pli grandaj, ĝis la tago kiam preskaŭ ĉiuj en la t.n. "liberaj merkatekonomioj" laboras ene de unu sama multnacia entrepreno. Tiu evoluo ekhavas sian impulson de la ideo pri grandskaleco kaj de la aŭtomatigo en la grandaj industrioj, sed ankaŭ de la

Bildo 16

## Hura, denove 2,5%-a alkresko!



*2,5%-a*
*alkreska kvanto*
*hodiaŭ*
*respondas al*
*9%-a*
*alkreska kvanto*
*en la 1950a jardeko.*

De kie devenas la freneza postulo pri pli granda kreskado?
Kiel ni povos nin liberigi de tiu postulo?
Kial stabilaj ekonomioj estas neeblaĵo?

---

pliiĝantajn socialajn problemojn, krome kaj politikajn kaj ekonomiajn ekscitojn.

Senrompita ekonomia kresko tamen rezultigas elsuĉadon de la naturrimedoj. Tio signifas *ke ni, en nia nuna monsistemo, estas devigataj elekti inter ekonomia aŭ ekologia kolapso.* Krome la monrimeda koncentrado en la manoj de malgranda nombro da individuoj kaj multnaciaj entreprenoj kreas ĉiaman bezonon de grandskalaj investoj, ekzemple nukleaj centraloj, grandaj digokonstruaĵoj por hidroenergio kaj fabrikado de armiloj. (Vidate el rigore ekonomia perspektivo estis la politike dubema agado de Usono kaj Eŭropo instali ĉiame

pli grandajn kaj pli efikajn armilojn kontraŭ Ruslando, samtempe kiel oni sendis buteron, tritikon kaj teknologian scion tien, tute racia: militista produktado estas la sola, kie oni povas prokrasti la satpunkton por eterne, same longe kiel la malamiko sammaniere povas evoluigi pli rapidajn kaj pli bonajn armilojn. Krome la profitoj en la militista sektoro multe superas tiujn en nia civila ekonomio.)

Tiel longe kiel ĉiu investo devas konkuri kun la potenco de la mono kaj ĝia ebleco sin pliigi en la valuta merkato, la plej multaj ekologiaj investoj - kun celo krei solidajn sistemojn (t e tiaj, kiuj finas kreski ĉe optimuma nivelo) fariĝos malfacile realigeblaj grandskale. Homoj, kiuj estas devigataj pruntepreni monon por ekologiaj projektoj hodiaŭ ordinare perdas ekonomie. Se la rentumo povus esti forigita, tiam almenaŭ estus egale ekonomie por ili, malgraŭ ke la diferenco restas kompare al aliaj investoj (ekz en armilaj negocoj).

Ni prenu investon en sunkaptiloj kiel ekzemplon. Se ni povos atendi nur 2%-an profiton de nia mono, tiam estus ekonomie nesaĝe investi en ĉi tiu cetere tiel ekologie saĝa teknologio por produktado de varma akvo, ĉar nia mono en la banko povus doni profiton de 7%.

Ŝanĝo en la monsistemo donus al homoj la ŝancon investi en konservado kaj plibonigo de la biologia bazo de la vivo - sen havi malprofiton, ekonomie vidate. Tio siavice kreus tre alispecan movforton por homoj engaĝiĝi - individue kaj grupe - en procedoj por konservado de la vivmedio kaj en pretigo de ekologie sanaj teknologioj.

La kvanto de la ekonomiaj aktivecoj ankaŭ pli facile adaptiĝus al veraj bezonoj. Ĉar oni ne plu bezonus altan kapitalan profiton por pagi rentumkostojn la premtrudado al superproduktado kaj superkonsumado estus multe malpliigata. La prezoj povus esti malaltigataj averaĝe 30-50%, kio momente kovras la kapitalkostojn. Teorie la homoj bezonus labori nur la duonan tempon kompare al

hodiaŭ sed tamen reteni saman vivnivelon.

En la nova monsistemo kvanta kresko kun granda probablo estus anstataŭigata per kvalita. Ĉar la homoj havu eblecon lasi sian novan monon en ŝparkonto, kie ĝi konservus sian valoron - aŭ investu ĝin en vitro, porcelano, mebloj, artaj produktoj aŭ en solide konstruita domo, kiuj ĉiuj ankaŭ konservus siajn respektivajn valorojn - estas tiam probable, ke multaj elektus tiajn "investobjektojn" kiuj riĉigus iliajn vivojn. Tamen estas tiel ke des pli oni pridemandus bonan kvaliton de tiuj varoj des pli estus produktata. Ni povus tiamaniere atendi tutan revolucion de valoro. Tio tutcerte influus kulturajn kaj mediajn demandojn. Multaj investoj en arto kaj ekologiaj projektoj povus iĝi konkurence fortikaj per helpo de "stabila" valuto kaj persista vivstilo, kiu precize estu profitiga, sen gajno. Sekve baldaŭ arto kaj ekologio povu fariĝi "ekonomie solidaj".

## Virinoj

Kial tiel malmulte da virinoj troviĝas en la ekonomia sfero? Aŭ ni rigardas la akcian merkaton aŭ la bankan mondon estas tiuj sferoj ankoraŭ la regno de la viroj kaj la esceptoj ŝajne nur konfirmas la regulon. Mi konvinkiĝis - pere de sufiĉe longa sperto de virinaj demandoj kaj projektoj - ke la plej multaj virinoj intuicie sentas ke nia nuna monsistemo ne funkcias. Malgraŭ ke ili, same kiel la viroj, kiuj travivas la samon, ne ekzakte scias, kie estas la eraro - ili tamen pravas.

La akra batalo de la virinoj por egalrajteco (kio ja ankaŭ grandparte estas ekonomia demando) igis ilin furiozaj pri la procedoj kiuj kreas malegalecon, kiel "la monludo". La plej multaj virinoj komprenas per sperto, ke kiam iu ekhavas monon sen laboro, kiel ekzemple tra la rento-sistemo, tiam estas iu alia kiu perlaboris ĝin. La lasta estas (ofte) virino. El tiu loĝantara duono, kiu nur posedas 4% el la totala riĉaĵo, (Bildo 11) la plimulto estas virinoj.

Virinoj portas la imprese plej grandan ŝarĝon de la ekonomia ĥaoso kaj la sociala mizero, kaŭzita de nia nuna monsistemo ĉie en la mondo. Por ili ĉiuj la situacio povus esti drame ŝanĝita per enkonduko de nova monsistemo, kiu funkcius kiel "teknike plibonigita interŝanĝa komerco". Pro tiu kialo mi atendas grandan procentaĵon de virinoj inter tiuj, kiuj marŝas ĉe la kapo por pli justa ilo por komerca interŝanĝo. Ili komprenas kion signifas esti ekspluatata. Post transformiĝo la virinoj tre certe povos sin dediĉi al banknegocoj kaj investoj en multe pli alta grado, ĉar ili komprenas ke nun temas pri vivakcelada sistemo en kiu ili volonte volas labori - kaj ne pri detruada. Laste sed ne malpli grave ĉi tiu monsistemo pli konvenas al la virina percepto pri potenco.

Viroj alkutimiĝis je hierarkia potencstrukturo, kun ĉiopova pinto kaj senpotenca bazo. Tiu kiu ekhavas pecon de la kuko lasas malpli al la ceteraj. Estas situacio kun gajnintoj en la unua flanko kaj malgajnintoj en la alia. Virinoj pli ofte imagas al si la potencon kiel io kun senfina kreska kapacito. Kiam virino enigas potencon en grupo, la tuta grupo ricevas pli grandan potencon. Estas situacio kun nur gajnantoj.

Monsistemo, kiu ekspansias, kiam la bezonoj kreskas, sed kiu haltas pligrandiĝi, kiam tiuj bezonoj kontentiĝis, kreas finfine preskaŭ aŭtomate - gajnsituacion por ĉiuj. En kriza situacio (kie ni ĵus nun estas) tio kreiĝas eĉ kun mallonga perspektivo.

Tio kio plej multe plaĉos al virinoj, kiam temas pri ili mem kaj iliaj infanoj, estas la ideo ke ni povus realigi molan transformadon - evolucion - anstataŭ ankoraŭ unu el tiuj kruelaj revolucioj, kiuj kaŭzis tian nemezureblan mizeron kaj doloron en la pasinteco.

## 4. Kion ni povas lerni de la historio?

Tiu monsistemo, kiun ni heredis de niaj pragepatroj estas pli ol 2 000 jaraĝa. La germana vorto por mono, *Geld*, montras rekte al ĝia origino, kiu estis Guld (oro). Oro, sufiĉe neuzebla metalo por alio ol juvelaĵoj kaj ornamaĵoj, fariĝis la ŝanĝilo, kiun oni preferis en la romana regno ĉirkaŭ la jaro 700 aKr. Mono ĉiam signifis moneroj. Tio estis ankaŭ tiu koncepto, kiu registriĝis en la konstitucio de Usono. Oraj kaj arĝentaj moneroj (aŭ ĝiaj konformaj valoroj en bankkambioj) estis la solaj tute akceptitaj pagiloj en Usono ĝis 1934. Ankoraŭ hodiaŭ multaj homoj rekomendas reiron al la orvaluto - speciale tiuj, kiuj vidas la malagrablajn flankojn de la preskaŭ senlima ebleco presi papermonon.

Kiam Silvio Gesell en la jaro 1904 eldonis sian libron *"Die natürliche Wirtschaftsordnung"* temis tri kvaronoj de la libro pri tiu demando.[26] Opozocie kontraŭ ĉiuj establitaj ekonomikistoj de lia tempo li provis montri, teorie kaj per praktikaj ekzemploj, ke la orvaluto estis ne nur nenecesa sed eĉ malutila por funkcianta monsistemo bazita sur senrentuma mono.

Hodiaŭ ni scias ke la orvaluto ne estas necesa. Nun ekzistas eĉ ne unu lando en la mondo, kiu bazigas sian monsistemon sur la orvaluto. John Maynard Keynes, kiu tre bone konis la laboron de Silvio Gesell, kunhelpis forpreni tiun obstaklon por funkcianta ekonomio en la 1930aj jaroj. Kion li tamen forgesis lanĉi estis la dua elemento en ŝanĝiĝo, nome anstataŭigi la renton per cirkuliga kotizo. Estas altgrade tial ni nun denove havas ekonomian malfacilaĵojn kaj ni ekhavos tion kun

konstantaj intervaloj, ĝis ni lernis la lecionon.

Por montri kiel malfacile estas atingi pli profundan komp-renon de la monproblemoj mi volas klarigi tion per kelkaj historiaj ekzemploj.

## Brakteatenmoneroj en la mezepoka Eŭropo

De la 12a ĝis la 15a jarcento oni uzis en Eŭropo monsistemon nomatan "Brakteaten". Mono estis eldonata de respektive urboj, episkopoj kaj regantoj. Ĝi estis uzata ne nur kiel interŝanĝilo de varoj kaj servoj sed estis ankaŭ uzata por pago de imposto. Tiu maldika monero, de oro aŭ arĝento, estis ĉiujare "retirata", refandigata kaj devalutigata per ĉirkaŭ 25% en ĉi tiu proceso.

Ĉar neniu volis ŝpari ĉi tiujn monerojn oni investis ilin en mebloj, stabilaj domoj, artaĵoj kaj aliaj aferoj, kiuj ŝajne povis reteni aŭ pligrandigi sian valoron. Dum ĉi tiu tempo kelkaj el la plej mirindaj religiaj kaj profanaj artverkoj kaj arkitekturaj kreaĵoj estiĝis. "Ĉar dum la valoro de la mono ne povis pligrandiĝi estis kreata vera riĉeco" [27] Ni ankoraŭ pensas je tiu tempo kiel kulmino de la kultura evoluo en la eŭropa historio. Metiistoj laboris kvin tagojn semajne, la "blua" lundo enkondukiĝis kaj la vivnivelo estis alta. Krome okazis apenaŭ iuj militoj aŭ maltrankvilecoj inter la diversaj potencgrupoj.

Evidente la homoj tamen malŝatis ĉi tiujn monerojn, kiuj perdis tiel multe de sia valoro en regulaj intervaloj. Tial en la fino de la 15a jarcento enkondukiĝis la "eterna" penco. Kun ĝi venis la rento kaj monhavaĵa kresko por ĉiam malpli da homoj, samtempe kiel la socialaj kaj ekonomiaj problemoj kreskis. La sperto de la supre menciita estas ke impostoj estu difinitaj aparte kaj ne kombinataj kun cirkuliga monkotizo.


## La Weimarrespubliko kaj la orvaluto

Dum la Weimarrespubliko (1924-33) la ĉefo de la nacia banko Hjalmar Schacht havis planojn krei "honestan" valuton en Germanio. Tio signifis, laŭ li mem, reiro al la orvaluto. Ĉar li ne povis aĉeti sufiĉe da oro en la monda merkato - konforma sumo al la mono necesa por la moncirkulado - li ekreduktis tiun laste menciitan. La malpliigita provizo de kuranta mono rezultis en pli altaj

Bildo 17

**Senlaboreco donas malriĉecon malriĉeco radikaligas.**

Senlaboreca statistiko kaj voĉoj por Hitlero (x) dum la Weimara respubliko (en milionoj)




Ĉu nin minacas nova radikalismo?
Kio kaŭzas la "novan malriĉecon"?
Ĉu ni povas malhelpi ĉi tiun evoluon?

rentumoj kaj sekve malpli da mono por investoj, kio siavice devigis la entreprenojn bankroti, pligrandigis la senlaborecon, pligrandigis la radikalecon de la socio kaj fine helpis al Hitlero ricevi pli kaj pli grandan potencon. Bildo 17 montras la kunligon inter malriĉeco kaj fortigita radikalismo en la Weimarrespubliko.

Ĉi tiun evoluon antaŭvidis Silvio Gesell - eĉ se estis pro aliaj kaŭzoj. Jam en 1918, tre baldaŭ post la unua mondmilito, kiam ĉiuj parolis pri paco kaj multaj internaciaj organizoj kreiĝis por certigi tiun pacon, Gesell publikigis jenan averton en letero al la eldonisto de la ĵurnalo *"Zeitung am Mittag" en Berlino:*

"Malgraŭ la sanktaj promesoj de ĉiuj homoj ekskomuniki militon unu fojon por ĉiam, malgraŭ la krioj de milionoj da homoj: "Neniam plu milito!", malgraŭ ĉiuj esperoj pri pli bona estonteco, mi devas diri ĉi tion: Se la nuna monsistemo, bazita sur rento kaj akumulita rento, daŭre funkcios, mi kuraĝas antaŭdiri ke prenos malpli ol 25 jaroj antaŭ ol ni havos novan kaj ankoraŭ pli teruran militon. Mi evidente povas antaŭvidi la venontan evoluon. La nuna nivelo de la teknologiaj sukcesoj rapide rezultigos rekordan plenumadon de la industrio. La konstruo de la kapitalo fariĝos rapida, malgraŭ la ekstremaj perdoj dum la milito, kaj pere de la kapitala troaĵo la rento estos malaltigata. La mono tiam restos en la trezorkesto. La ekonomiaj aktivecoj malpligrandiĝos kaj kreskanta nombro da senlaboruloj ĉirkaŭvagados sur la stratoj... inter la miskontentaj amasoj sovaĝaj revoluciaj ideoj ĝermos kaj la venena planto "Supernaciismo" kreskos. Neniu lando komprenos la alian, la fino nur povos esti denove milito." [28]

Se oni rigardas historie pri kio vere okazis, kun la rezulto en la mano, tiam la mono ne kreskis en la trezorkesto. La Nacia banko kreis mankon de mono, sed la efiko estis la sama. Ankoraŭ hodiaŭ ŝajnas ke la ĉefbankoj ignoras la bazan solvon de la problemo, kiun ili ĉiame havas antaŭ la okuloj.

# 5. Kion mi povas fari por faciligi la aliiĝon?

## Esti informita, kreskigi la konsciencon ĉe aliaj

La plej granda obstaklo por ŝanĝigo de la monsistemo estas ke tiel malmultaj homoj komprenas la problemon kaj ankoraŭ pli malmultaj scias, ke ekzistas solvo. Sed depost oktobro 1987, kiam 1,5 bilionoj da dolaroj malaperis en Wall Street, homoj estas pli volontemaj aŭskulti. Esti ĝisfunde informita kiamaniere la rentumo kaj kunmetitaj rentumoj funkcias estas la unua paŝo al ŝanĝiĝo. Povi diskuti la solvon kun ties diversaj sekvoj estos posta paŝo.

Komencu inter geamikoj kaj familianoj kaj provu kiel bone vi povas klarigi la temon. Poste daŭrigu kun homoj kiujn vi konas iom malpli bone, kaj poste ne hezitu paroli kun via bankisto, via asekurista agento, lokaj politikistoj, ĵurnalistoj kaj amasmediaj homoj. Per multaj diskutoj kun profesiuloj, bankistoj kaj ekonomiistoj mi konvinkiĝis ke ne ekzistas iaj "realaj" malfacilecoj, nur mensaj blokadoj, kiuj evoluiĝis per instruado kaj limigantaj kredsistemoj pri kio mono vere estas kaj kiel ili devas funkcii.

Estu prikonscienca, ke mono estas tre centra temo en la vivo de multaj homoj. Tial ĝi intime dependas de la bildo de la homoj pri si mem kaj pri la mondo. Malavareco aŭ avareco, malfermiteco aŭ fermiteco, varmo aŭ malvarmo, la konduto de la homoj en aliaj interligoj ankaŭ speguliĝos en ilia sinteno rilate monon. Ordinare estas malfacile trakti monon kiel apartan aferon. Kiel ajn vi faros vi unue devas klarigi kiamaniere la rento akumulas valoron, antaŭ ol vi ektraktos simptomojn, kiuj povos

ekesti, ekzemple en la sociala aŭ politika sfero. Se vi ne komencas per tio la tuta diskuto povos fariĝi multe pli malfacila.

Estu prikonscia, ke monreformo, eĉ se ĝi estas ligita kun multaj aliaj problemoj, ne aŭtomate solvos ilin ĉiujn. Ĝi ne de si mem prizorgos malriĉulojn, maljunulojn aŭ malsanulojn aŭ kontentigos aliajn socialajn bezonojn. Monreformo faciligos helpi tiujn grupojn, sed tio ne signifas, ke ni povos preterlasi fari specialajn programojn aŭ strategiojn por solvi socialajn problemojn. Same validas por demandoj ene de ekologio, uzo de disponeblaj rimedoj, k.a.

Per sekvado de la ĉiutaga debato pri la monda situacio vi pliigos vian komprenon pri kiel necesa kaj konvena tiu ĉi ŝanĝo estas. Ĉiuj kun sento por respondeco, kiuj scias pri solvo, devas fari ĉion por disvastigi scion pri tio.

## Apogi modelprovojn

La plej grava preparo por transiro al senrentuma monsistemo estas starigi kelkajn provojn en la "vera vivo". Tiaj donos al ni ideojn pri kia efiko ĉi tiu ŝanĝo havos, kiam ĝi realiĝos grandskale.

Estus plej avantaĝe se tiuj regionoj aŭ landoj, kiuj montris intereson por eksperimenta provo, povis kunordigi sian agadon. Tiam ni nome havus pli grandan fidindecon, kiam ni inspektas la rezultojn, faritajn dum diversaj socialaj, kulturaj kaj ekonomiaj premisoj. La elektitaj regionoj estu sufiĉe grandaj por doni fidindan komparan bazon por la tuta lando. Altgrada memstareco estos ankaŭ dezirinda. Tio signifas, ke multaj el tiuj varoj kaj servoj, kiuj estos bezonataj, estos akireblaj ene de la eksperimenta regiono. La dua ebleco estas anstataŭe elekti krizregionon kun malalta konjunkturo kaj granda senlaboreco, - kio ofte estas sekvo de malmulta diferencigo - kaj tie krei impulson al pli diferencigita kaj stabila

ekonomio per enkonduko de nova monsistemo. En tia *situacio ankaŭ ŝanĝo ŝajnas pli alloga. Homoj ŝajne estas* pli malfermaj por ŝanĝo, kiam ili vivas en malbona sistemo, speciale se ili povas kompreni ke ili fakte povos ĉion gajni kaj nenion perdi en la procedo, kiel estis en Wörgl (ĉapitro 2).

Aliflanke povas relative malgranda, diferencigita kaj sana regiono ankaŭ vidi la avantaĝojn de enkonduko de nova monsistemo tre klare, kaj ĉi tie ankaŭ povos la pozitivaj efektoj de la ŝanĝo pli rapide evidentiĝi.

Por kompreni kion signifas senrentuma mono en diversaj socialaj kunligoj ni prefere ne limigu la eksperimentojn al nur unuspeca situacio.

## Starigi lokan interŝanĝan komercon

El ĉiuj eksperimentoj kun interŝanĝoj de varoj kaj servoj, faritaj ekster la nuna monsistemo, estas tiu, kiu stariĝis de Michael Linton en la insulo Vankuvero en Kanado la plej konata. Estas ankaŭ tiu, kiu estas plej facile adaptita al ĉiu ajn tipo de regiono. La LET-sistemo ("Local Exchange Trading", loka interŝanĝa komerco) funkcias tutsimple kiel sistemo de transakcioj per "verdaj" dolaroj, kie ne estas metita kotizon al la dolaro, sed tamen al ĉiu transakcio. Homoj inter si decidas kiom da "verdaj" kaj kiom da "normalaj" dolaroj ĉiu varo, kiun ili vendas aŭ aĉetas, kostu. Poste ili transigas siajn ŝuldojn kaj bonhavojn en komputorizita kalkulcentralo. La limon por iliaj ŝuldigoj oni povas jam antaŭe pridecidi kaj poste ŝanĝi, se necesos. En tia maniero la risko estos minimuma por ĉiuj partoprenantoj. Evidente estas, ke des pli da personoj, kiuj partoprenas, des pli profita estos la sistemo.

En ĉi tiu maniero malgranda socio proksime al Vankuvero helpis juna dentisto, al kiu mankis mono al konsultejo. La homoj en la malgranda socio konstruis domon kaj konsultejon, plejparte per verda mono.

En Svislando estas WIR "La interŝanĝa ringo", kiu agas en la tuta lando, unu el la malmultaj restaĵoj, kiuj ankoraŭ restas de provo krei senrentuman interŝanĝan sistemon. Ĝi ankaŭ funkcias pere de kontosistemo, kie debeto kaj kredito balanciĝas centrale.[29]

Estas politike saĝa sinteno apogi ĉiujn provojn de alternativoj kiam temas pri ekonomiaj sistemoj kaj helpi al homoj pli bone kompreni la intencon pri mono kaj kiel ĝi vere funkcias. Spertoj de realaj provoj ja donas alian komprenon ol kiu ajn libro aŭ prelego.

## Apogi etikajn investojn

Paŝo, kiun ĉiuj tuj povas preni, estas prizorgi ke ilia mono estos investita en etike ĝusta maniero. Post kiam pli kaj pli da homoj ekkomprenis la socialajn kaj moralajn efikojn de etikaj investoj tiuj elkreskis kiel fungoj el la tero. Fariĝis movado kun vendosumo de multaj milionoj. Esprimita per la vortoj de Hazel Henderson: "Kreskanta armeo de ordinaraj homoj staris sur sia sojlo, sentis la fiodoron de putrado kaj ne plu eltenas la scion, ke ilia mono funkcias kontraste al ilia vividealo."[30]

Etikaj investistoj esploras eventualajn investojn el kaj socialaj kaj ekonomiaj perspektivoj. Homoj kiel Robert Schwarz, pioniro kiam temas pri sociale respondecaj investoj, komencis per forviŝo de certaj entreprenoj kun malbona laborista politiko, entreprenoj kiuj malpurigis la medion, inkluzive ĉiuj, kiuj laboris por la nuklea industrio kaj tiuj entreprenoj, kiuj favoris al subpremaj reĝimoj, kiel tiu de Sud-Afriko.[31]

Media konscienco estas ne nur vitala morala opinio, sed ofte ankaŭ montras sin esti ekonomie avantaĝa, speciale kiam la situacio estas tiel malbona pro la pli antaŭa senskrupula ekspluatado de rimedoj. La nuklea industrio ekzemple per siaj akcidentoj kaj purigaj kostoj, donis acidan postguston al investistoj en Usono dum

kontraŭe la alternativa energio bone sukcesis lastatempe.

La plej granda avantaĝo kun etika investa politiko estas ke ĝi povas realiĝi tuj. Ĉu ni ŝanĝas monsistemon pli aŭ malpli frue, etikaj investoj estas bonega ideo, sen konsidero de kiu ajn ekonomia sistemo regas.

# 6. Monreformo kaj tutmonda ŝanĝo

Tiu ĉi libro temas ĝuste pri la temo "monreformo" kiel grava aspekto de profunda, tutmonda ŝanĝprocedo, kiun ni baldaŭ ekvidos. Tio ne signifas, ke ne aliaj aspektoj estas same gravaj. De organiza al individua ŝanĝo, de teknologia al spirita ŝanĝo; la ŝanĝo estas necesa kie ajn ni rigardas sufiĉe profunden en tio, kion ni havas kaj komparas kun tio, kion ni vere deziras.

Kiel mono funkcias kaj kiel ĝi vere influas al la socio estis evidente malatentite, malgraŭ ke tio ŝajnas esti tre signifoplena parto de la puzlo. Nek ekspertoj nek tiuj, kiuj okupas sin per alternativoj al la nuna ekonomia sistemo ŝajne maltrankviliĝos pro tiu temo. Ĝi eble ne estas pli grava, sed vere ankaŭ ne malpli grava ol aliaj. Mono tutsimple tuŝas ĉiujn.

## Evolucio - ne revolucio

Malgraŭ ke la tri reformoj - pri mono, tero kaj impostoj - proponitaj en ĉi tiu libro, nur estas parto de ĉiuj ŝanĝoj, kiuj necesas por nia travivado, ili fakte bone aplikiĝas al multaj provoj realigi pli bonajn rilatojn inter homo kaj naturo kaj inter homo kaj homo. *Sociala ĵusteco, ekologia travivado kaj nia libereco estas minacataj, kiam ni permesas al tiaj sociaj strukturoj bonfarti, kiuj en si mem tendencas kontraŭagi tiujn celojn.*

La proponitaj reformoj kombinas tutklare la avantaĝojn de la kapitalismo kun tiuj de la komunismo. Ili evitas respektivajn mankojn de ĉi tiuj ideologioj kaj proponas al ni "trian vojon". Ili permesas individuan liberecon evo-

luĝi ene de libermerkata sistemo kun konsiderinde pli alta grado de sociala egaleco ol la nuna.

Samtempe ili haltigas la eluzadon de eta malplimulto de la granda plimulto de homoj, sen enkonduki la pezan direktadon de planekonomio aŭ ĉiopova burokratismo. La komunista provo krei liberecon de ekspluatado malsukcesis pro tio ke oni forprenis la personan liberecon por garantii certan bazan vivnivelon. Aliflanke la kapitalismo tendencas lasi landon kaj kapitalon libera por ekspluatado en senbrida aplikado de individua libereco kaj tial ekminaci la ekzistominimumon por la plimulto de ni homoj. Ambaŭ sistemoj iris tro longe, ĉiu en sia maniero. La unua privilegiis la liberecon de malsato antaŭ la individua libereco. La alia maksimume privilegiis la individuan liberecon, kiun - en la nuna ekonomia sistemo - nur povas eluzi malgranda nombro da homoj. Ambaŭ parte pravas, sed ambaŭ malsukcesis krei kondiĉojn por vere homa vivo same kiel por vera libereco.

La proponitaj reformoj povas malgrandigi ŝtatan enmiksiĝon kaj povas krei ekologian ekonomion, en kiu varoj kaj servoj povas esti produktataj al optimuma kvanto kaj kombino. Estas nome je la optimuma nivelo varoj kaj servoj fariĝos plej malmultekostaj, t.e. plej konkurence fortaj.

Dum la plena efiko de la alidisdivido de la riĉaĵoj pere de la mon- kaj landsistemoj estas malpli evidenta en la riĉaj industrilandoj pro la ekspluatado de la evolulandoj, la laborantaj homoj en la evolulandoj vere devas pagi la prezon por la monsistemo de la industrilandoj.

Malgraŭ ke tiuj homoj plej multe suferas estas tamen nemulta espero, ke tiuj ideoj unue estos aplikataj en ŝtatoj kie etaj elitistaj grupoj dominas rilate monon, terposedadon kaj politikan potencon. En la pli malgrandaj ŝtatoj de Eŭropo kun demokrata regado tamen povas ekzisti kondiĉoj por ŝanĝo. Skandinavio ekzemple kun relative riĉa kaj edukita loĝantaro, estas kompare malfermita por socialaj

ŝanĝoj. Kaj estas ĵus pri tio la monreformo temas.

Dum la publika pridemandado de la UNa mondkomisiono en Moskvo la 11-an de decembro 1986 sin esprimis A S Timosjenko ĉe la Ŝtatscienca Instituto, Soveta Scienca Akademio, jene:

"Hodiaŭ ni ne povas garantii la sekurecon de unu lando je la kosto de alia ŝtato. La sekureco nur povas esti tutmonda kaj la sekureco ne povas esti nur politika aŭ militista. Ĝi ankaŭ devas esti ekologia, ekonomia kaj sociala. Ĝi devas garantii ke la homaj strebadoj en sia tuteco povos esti realigitaj."[32]

La homara batalo por sociala kaj ekonomia justeco estis longa kaj perforta. Ĝi okazigis akran diferencon inter diversaj politikaj kaj religiaj vojoj. Ĝi kostis multajn vivojn. Nun vere estas nepre necese, ke ni ekkomprenu, ke neniu pli longe povas garantii sian propran sekurecon je prezo de alia homo aŭ je prezo de la naturo, de kiu ni ĉiuj estas parto. Por ebligi tion ni bezonas profundajn kaj efikajn ŝanĝojn de la strukturo de nia sociala medio. Espereble tiuj ŝanĝoj, kiuj estas proponitaj en ĉi tiu libro, kontribuos al kreado de sekureco kaj justeco por ni homoj kaj nia tutmonda medio kaj fine ekanstataŭigu la revolucion per evolucio.

# Notoj


1. Eckhard Eilers, ne publikita manuskripto, Rastede, 1985
2. Eilers, ne publikigita citaĵo.
3. "Ich sehe die Risiken ganz genau", interparolo pri la risko de financa kraŝo kaj la ŝulda krizo, *Der Spiegel*, no 25, p 59, Hamburg, 1987.
4. Helmut Creutz, *Wachstum bis zur Krise*, Basis Verlag,Berlin, 1986, p 8.
5. Dieter Suhr, *Geld ohne Mehrwert*, Knapp Verlag, Frankfurt am Main, 1983.
6. Silvio Gesell, *Die natürliche Wirtschaftsordnung*, Rudolf Zitzmann Verlag, Nürnberg, 1904; 9-a eldono 1949.
7. Werner Onken, "Ein vergessenes Kapitel der Wirtschaftsgeschichte. Schwanenkirchen, Wörgl und andere Freigeldsexperimente", *Zeitschrift für Sozialökonomie*, no 58/59, maj 1983, p 3-20.
8. Fritz Schwarz, *Das Experiment von Wörgl*, Genossenschaft Verlag, Bern, 1952.
9. Dieter Suhr, *Capitalism at its best*, ne publikigita manuskripto, 1988, p 122
10. Hans R L Cohrssen, "The Stamp Scrip Movement in the USA", Suhr 1988.
11. Suhr 1988, p 122.
12. Yoshito Otani, *Ursprung und Lösung des Geldproblems*, Arrow Verlag Gesima Vogel, Hamburg, 1981.
13. Henry George, *Progress and Powerty*, San Francisco, 1879. (En la sveda: *Framåtskridandet och fattigdomen*, Stockholm, 1950.)
14. Gesell, n p cit, p 74.
15. Yoshito Otani, *Die Bodenfrage und ihre Lösung*, Arrow Verlag Gesima Vogel, Hamburg, 1981.
16. Pierre Fornallaz, *Die Ökologische Wirtschaft*, AT Verlag, Stuttgart, 1986.
17. Hermann Laistner, *Ökologische Marktwirtschaft*, Verlag Max Huber, Ismanning bei München, 1986.
18. John L King, *On the Brink of Great Depression* II, Future Economic Trends, Goleta, Ca., 1987, p 36.
19. Fritjof Capra, *The Turning Point*, Simon and Shuster, New York, 1982.
20. La Monda komisiono por medio kaj evoluo, *Vår gemensamma framtid*, Prisma/Tiden, Stockholm, 1988, p 18-20.
21. *Der Spiegel*, n p cit, p 59.
22. John Maynard Keynes, *The General Theory of Employment, Interest and Money*, London 1936; nova eldono 1967, p 355.(En la sveda: *Sysselsättningsproblemet. Allmän teori för produktion, ränta och pengar*, Stockholm, 1945,
(Atentu. Tiu libro venis en reviziita traduko kun la titolo en sveda: *Allmän teori om sysselsättning, ränta och pengar. Lysekil, 1994.)*
23. John L King, n p cit, p 162

24. *Aachener Nachrichten*, 29 majo 1985.
25. *Weltwirtschaftswoche*, no 4, 1984, p 23.
26. Gesell, n p cit.
27. Hans R L Cohrssen, "Fragile Money", *The new Outlook* septembro 1933, p 40.
28. *Zeitung am Mittag*, Berlin, 1918.
29. Onken, n p cit.
30. Hazel Henderson, citita en Jennifer Fletcher, "Ethical Investment" en *International Permaculture Journal*, Permaculture International Ltd, Sidney, Australien, 1988, p 38.
31. Robert Schwartz, citita en Fletcher, n p cit, p 39.
32. A S Timosjenko, citita en Monda komisiono por medio kaj evoluo, n p cit, p 320.
33. En pli malfrua eldono de ĉi tiu libro Margrit Kennedy precizigas tiun informon: "En 1989 la kolektita oficiala ŝuldo de la tria mondo sumiĝis je 1261 miljardoj da dolaroj. Tiu sumo estas pli malgranda ol la kunigitaj rentumoj kaj dekalkuloj je 1583 miljardoj da dolaroj, pagitaj dum la periodo 1977-89. Tio signifas ke la ŝuldo estas jam pagita. (Fontoj: *World Debt Tables*, La Monda Banko kaj Irwing S Friedman: *The World Debt Dilemma: Managing Country Risk*, Council for International Banking Studies, Washington D C kaj Robert Morris Ass., Philadelphia P A.)

Jen estas libro, kiu per kelkaj simplaj manieroj renverŝas nian kutiman pensadon pri ekonomiaj demandoj

La okcidentgermana arkitekto kaj ekologia ekonomiisto Margrit Kennedy ĉi tie montras ke la rentumo estas la granda barilo por multaj investoj, precipe de etskala kaj rimedkonservanta speco.

La kaŭzo estas tio, ke ni pagas altajn rentumkostojn por ĉio, kion ni aĉetas, ankaŭ por manĝo, akvo kaj loĝejoj.

Kennedy asertas ke senrentuma kaj seninflacia ekonomio estas ebla kaj krome vojo for de minaca tutmonda ekonomia kaj ekologia kolapso, kie la ŝuldoŝarĝo de la tria mondo estas la plej eksploda faktoro.

"Ekonomio sen rentumo kaj inflacio" estas la unua libro de Margrit Kennedy en esperanto. Ŝi antaŭe publikigis librojn pri ekologia urboplanado. Ŝi ankaŭ laboris por UNESKO kaj OECD kaj kiel ĉefo de la ekologia planado ĉe Interbaŭ en Berlino. Momente ŝi agas ĉe La Perma-kultura Instituto en Steyerberg.